

N-ro 156-157 somero-vintro 2012

# ISRAELA ESPERANTISTO



ISSN 1565-3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo  
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו בישראל

**Agado de ELI: la Azia Kongreso, la 125-a Jubileo ... (A. Wandel)**

**Impresoj de la Israela Kongreso (Dieter kaj Yoshie Kleemann)**

**Kiam israelanoj silentas (Tsvi Sadan)**

"Paco sur Jerusalemo" – desegnaĵo de la pentristo Joni Kis-lev, estrarano de ELI kies vivhistorio montras kiel ĉiu povas sukcesi



**Adiaŭ, Josi Ŝemer (A. Wandel)**



*Redaktoro* Amri Wandel  
*Provleganto* Jehoŝua Tilleman  
*ELI -Prezidanto* Amri Wandel

*Redakcia adreso*  
P.O.K. 22041, 61220 Tel-Aviv  
[eli@esperanto.org.il](mailto:eli@esperanto.org.il)

*Retejo:* <http://esperanto.org.il/ie.html>  
*Fondita 1959 kiel 'Nia Ligilo'.*



*Karaj legantoj,* Post kvin jaroj de mia redaktado de IE, eble temp' esta' ekserĉi la sekvan redaktoron... Tiun-ĉi duoblan n-ron malfermas raporto pri la agado de ELI kaj la Azia Kongreso. Sekvas artikoloj pri nia Kongreso en Bejt Ŝean, pri la UK kaj IJK en Hanojo kaj pri kunveno en Italio kaj Germanio. Sekvas la movadan parton literatura frandaĵo - rakonto de Rami, teatraĵo de *Oscar Wilde* kaj recenzo de Holokausta verko de *Felicia Raszkin-Nowak*. En la Persona Angulo aperas Joni. Fine sed ne laste ni funebras pri Josi, kiu dum multaj jaroj redaktis IE-n. Estu lia memoro benata. *Amri*

*Kovrilo:* "Paco sur Jerusalemo" – desegnaĵo de la pentristo Joni Kis-Lev, ELI-estrarano kies vivhistorio montras kiel ĉiu povas sukcesi.

*Grafiko,* enpaĝigo kaj fotoj:  
A. Wandel

Abontarifo eksterlanda: 10 EUR.  
Eblas pagi al UEA-konto *elia-q*  
ĉe la Libroservo de UEA.

## Enhavo

- 3 Agado de ELI: la Azia Kongreso, la Jubileo kaj pli ..... *Amri Wandel*
- 5 Israela Kongreso en Bejt-Ŝean..... *Dieter kaj Yoshie Kleemann*
- 8 La UK en Hanojo ..... *Amri Wandel*
- 12 La IJK en Hanojo ..... *Sergeo Meir Goren*
- 14 Tri Internaciaj Festivaloj 2011-2013..... *Amri Wandel*
- 17 La Itala Kongreso de Esperanto ..... *Yael Shelach*
- 18 Kiel mi fariĝis bapto-patro ..... *Rami Ŝlain*
- 21 Kiam israelanoj silentas ..... *Tsvi Sadan*
- 25 Zamenhof, la kuracisto ..... *Michal Amir*
- 28 La graveco de seriozeco..... *Oscar Wilde (trad. Doron Modan)*
- 33 Mia stelo - *Felicia Raszkin-Nowak* ..... (*recenzas Andreas Künzli*)
- 37 Filatelaj novaĵoj el Israelo ..... *Jehoŝua Tilleman*
- 40 Persona Angulo: Joni Kis-Lev ..... *Jehonatan Kis-Lev*
- 45 ELI funebras: Josi Ŝemer ..... *Amri Wandel*

# Viglan agadon en Israelo sponis la Azia Kongreso kaj la Jubileo

aperas samtempe en *Esperanto*, januaro 2013\*

**Amri Wandel**

"Ĉu Israelo ne troviĝas en Europo?" estis la reago de pluraj aktivuloj de KAEM (Komisiono de Azia Esperanto-Movado de UEA) kiam antaŭ tri jaroj, la novaliĝinta Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) invitis la sepan Azian Kongreson al tiu fora angulo de Azio: ĝis tiam la plej okcidenta Azia Kongreso okazis en Nepalo.


Tamen, dum la sesa Azia Kongreso en Mongolio en 2010, KAEM oficiale decidis okazigi sian sekvan Kongreson en la jaro 2013 en Israelo. Tiu decido sponis tujan entuziasmon en ELI. Oni ekplanis kiel ripeti la pozitivan sperton de la UK en Tel-Avivo, en la jaro 2000. La konstanta organiza teamo de la jam famiĝantaj Israelaj Kongresoj komencis labori, kvazaŭ temus pri iom pli granda ol kutima landa kongreso. Por ne kolizii kun la UK kaj por eviti la someran varmon, la kongreso okazos meze de aprilo (18-22.4.2013), kaj kiel kongresurbo estis elektita Jerusalemo. Tiu elekto ebligas konvenan turisman kovron de la

tuta lando ene de du semajnoj: antaŭkongreso en la norda parto, duontagaj ekskursoj en Jerusalemo kaj apude dum la kongreso, kaj postkongreso en la Morta Maro, la sudo kaj Jordanio. La riĉa turisma programo reflektas ankaŭ la kongresan temon: "ekologio de paco – kunvivado de homo, medio kaj naturo". Por la distra parto estis kontraktitaj Kajto, kaj denove Jomo, kiu sukcesege koncertis en la pasintjara Israela Kongreso.



La bezono informi al la tuta Esperantujo spronis la rapidan konstruon de nova retejo por ELI en la somero de 2011. En aparta paĝo (<http://www.esperanto.org.il/ak2013.html>) iom post iome akumuligis la informoj pri la Azia Kongreso: unua kaj dua bulteno, turisma programo, reta aliĝilo kaj listo de aliĝintoj. La Ministerio pri Turismo helpis produkti la materialon prezentitan dum la UK kaj IJK en Hanojo: mil flugfolioj kaj granda staranta afiŝo, kiun oni vidis dum la Movada Foiro kaj kurioze ankaŭ dum la Aŭkcio, kiam Humphrey Tonkin ofertis la kongresnumeron **unu** (aĉetis ĝin Finnino). Ankaŭ la junularo vigle aktivis pro la organizado de la 69-a IJK, kiu koincide okazos samjare en Israelo.

Plian impeton provizis la jubilea jaro. Kiel flagŝipan projekton por la 125-a jubileo ELI decidis verki hebreajn subtitolojn por la filmo "La Universala Lingvo" reĝisorita de Sam Green, por ĝin prezenti en la Israela Televido. Post kelkaj monatoj da laboro la teamo (traduko: Amri



El la israela televida programo Roim Olam – bildo el la filmo "La Universala Lingvo"



Wandel, subtitoloj kaj teknika redaktado: Gian Piero Savio) kompletigis la laboron. La malnetaĵo estis projekciita dum la Israela Kongreso en Majo, kaj la finprodukton ni ofertis al la populara programo "Roim Olam" (novaĵoj el la mondo), kiu siatempe verkis bonegan raportaĵon pri la UK en Tel-Avivo (<http://www.youtube.com/watch?v=VtRDlqya5rw>). Bonŝance la redaktoro kaj prezentisto de tiu programo, Jaakov Aĥimeir, bone memoris la raportaĵon de la jaro 2000 kaj tuj ekŝatis la ideon elsendi la filmon en la 125-jubilea dato, 26-an de Julio. Bedaŭrinde pro subitaj gravaj novaĵoj la elsendo estis plurfoje prokrastita, ĝis fine fiksita por alia grava dato de Esperanto: la 15-a de Decembro. Komence de la raportaĵo la redaktoro salutis en Esperanto kaj menciis la datrevenon de Zamenhof, la jubilean jaron kaj la Azian Kongreson en Jerusalemo [ndlr: la raportaĵo nun videblas en YouTube: <http://www.youtube.com/watch?v=rcJpsiwlPjI>].

Dum la Zamenhofa Vespero kaj la Landa Kunveno okazinta en Tel-Avivo tri tagojn poste, la ĉeestantoj aŭdis detalan raporton pri la agado de ELI dum la jaro kaj pri la planoj por la Azia Kongreso. Oni elektis novan estraron kaj spektis varian artan programon. Fine okazis vigla debato pri estonta agado.

\* <http://www.esperanto.org.il/dosieroj/esperanto201301.pdf>

## Israela Kongreso en Bejt-Ŝean

**Dieter kaj Yoŝie Kleemann, Germanio**

---

De la 10-a ĝis la 12-a de Majo 2012 okazis en Bejt-Ŝean la 13-a Israela Kongreso de Esperanto. Ĝi estis rekorda laŭ nombro de la partoprenantoj, kaj aŭguras ankoraŭ pli sukcesan venontjaran eventon – la Azian Kongreson en Jerusalemo (18-22 Aprilo 2013), kun simila postkongreso.

Dum la 28-a Internacia Festivalo en Xanten,

Germanio, Amri Wandel, la

prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, invitis nin al la 13-a Israela Esperanto-Kongreso en la antikva urbo Bejt-Ŝean. Ĉio estis nova por ni. Ni ege antaŭĝojis la dusemajnan restadon en la problemriĉa lando de la religioj. Por ni la kongreso komenciĝis jam en Tel-Avivo ĉe la trajna stacidomo Savidor, de kie aŭtobuso transportis nin kun aliaj esperantistoj al la kongresurbo nordorienten. Regis gaja atmosfero kun laŭta babilado. Israelanoj emas vigle diskuti inter si kaj ĝui la kunvivadon. La kongresejo



Dieter kaj Yoshie flosas en la Morta Maro





Komuna foto dum ekskurso en la Aŭstralia ĝardeno en parko Sahne

– junulargastejo de Bejt-Ŝean estis taŭga, kun diversaj grandaj ĉambroj bone ekipitaj. Ĉeestis proksimume 60 esperantistoj, junaj kaj maljunaj. Eksterlandaj gastoj krom ni estis Hermann kaj Karin el Dresdeno, Andreas el Essen, kaj Rolf – 91-jara fervojista aktivulo el Norvegio. Kaj plej grave: jOmO kaj Mikaelo Bronŝtejn kiel amuzigaj motoroj por la vespera kunesto. Tre laŭdindaj estis la tri personoj kiuj kunorganizis la tutan kongreson: Nava, Esti kaj Amri – majstroj de la improvizado. De la 10-a ĝis la 12-a de majo ni havis plurajn informriĉajn ekskursojn kaj posttagmeze okazis kleriga programo. Tri ekskursoj aparte impresis nin. Unue, la nokta(!) vizito al la ampleksa arkeologia parko de Bejt-Ŝean: post lumsona historia spektaklo ni promenis en la mallumo tra la romiepokaj ruinoj, laŭlonge de lumigitaj kolonaj pasejoj. Due, matena vizito al la kibuco Sde-Elijahu, kie ni estis informitaj pri ĝia biologia agrikulturo. Mario, 94-jara pioniro, verve rakontis pri siaj multjardecaj spertoj kaj eltrovoj. Trie, ni ekskursis posttagmeze al la “Jordana Stelo” (“Belvoir”), surmonta ruinigita fortikaĵo de krucmilitistoj kun belega elrigardo al la Jordan-valo ĝis la Golan-montaro, la Tiberiada lago, kaj en la fono al la brunflava montoĉeno de Jordanio. En la kleriga programo aktivis Mikaelo Bronŝtejn, kiu prezentis superrigardon pri siaj verkoj prozaj kaj poemaj. Sed unu temo ĉefe kaptis nian atenton: lia 10-jara laboro kiel teknikisto en

la arkta mineja urbo Vorkuta, 3 000 km norde de Moskvo. Ni montris fotoserion de nia februara esplorovojaĝo al Antarktiko, hejmo de miloj da ĉarmaj pingvenoj kaj pacemaj fokoj. Ĉiuvespere niaj muzikistoj jOmO kaj Mikaelo instigis nin laŭte kunkanti kaj amuziĝi. Israelo scias festi! Post la Israela Kongreso ni, eksterlandanoj, komencis turisman programon. Sub la gvido de Jehoŝua ni unue iris nordokcidenten al Tiberiado, Nazareto, Hajfo kaj Akko. La kulmino en Hajfo estis la promenado tra la preskaŭ paradizaj ĝardenoj de la Bahaa Monda Centro sur la deklivo de la Karmel-monto.

En Akko, la lasta bastiono de la krucmilitistoj, ni ĝuis veran orient-ekzotikan etoson en la malnovaj urbo kaj haveno. La postan tagon, veninte al Jerusalemo, ni travagadis la malnovan urbon kun la



fama Muro de Lamentoj, la plej sankta loko por la judoj, kaj la Roka Kupolo kun grandega orumita kupolo, religia centro por la muzulmanoj. De la 16-a ĝis la 19-a de Majo okazis la plej ekscita aventuro de la vojaĝo. Veturo per la Esperanto-ŝipo al la sudo tra la Negev-dezerto, gvidita de la neniam laciĝema ĉiĉerono Amri. Niaj celoj: Kumran, Ejn-Gedi, la Morta Maro, Masada, pluraj krutaj dezertaj kanjonoj, dezerta besta naturrezervejo *HajBar* kaj finfine Ejlat. 450 metrojn alta super la Morta Maro leviĝas la monto Masada, kie la reĝo Herodo konstruigis fuĝpalacon en romia stilo sur tri montaj ŝtupoj. Tiuloke finiĝis la lasta ribelo de la judaj zelotoj kontraŭ la romia armeo dum la jaroj 70-73 p.K. Nuntempe ĝi estas grava simbolo de la juda identeco. Survoje al Ejlat Amri elektis la grandiozan kanjonon Barak por aktivigi nin al unuhora grimpadado ĉiam supren laŭlonge de la kruta montodeklivo. Kulmina agado en la turisma

urbo Ejlal estis por ni dufoja subakva naĝado (kun masko) laŭlonge de spirrava koral-rifo, por observi belegajn ekzotajn fiŝojn. Fine ni reveturis al Jerusalemo kaj al Tel-Avivo. En la nova Jerusalemo ni ektrovis veran artan juvelon: la 12 vitralajn fenestrojn de Chagall en malgranda sinagogo de la universitata hospitalo "*Hadassah*" en Ejn-Kerem. La dusemajnaj travivaĝoj en Israelo kun multaj interesaj homoj donis al ni neimageblan forton kaj junecon. Pro tio ni elkore dankas al ĉiuj, kiuj ebligis al ni tiun sperton.

Verkita por IE, aperis en *Esperanto*, julio 2012

## La UK en Hanojo

**Amri Wandel**

La stratoj de Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamio, estis plenaj je miloj da verdaj banderoloj bonvenigantaj la Universalan Kongreson de Esperanto, ambaŭlingve, vjetname kaj Esperante. Ĉi-jare nur du israelanoj partoprenis la Kongreson: Martha Otto, kiel prezidantino de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL), kaj mi kiel UEA-estrarano. Sed jam sabate, en la Movada Foiro (kiu en la lastaj jaroj efektive kaj sukcese anstataŭas la antaŭan Interkonan Vesperon) ni du kunlaboris ĉe la tablo de ELI. Ni utiligis grandan star-afiŝon de la 7-a Azia Kongreso en Jerusalemo, kiun mi sukcesis akiri de la Ministerio pri Turismo, kaj milon da flugfolioj de la unua bulteno; ankaŭ ĝin mi verkis kaj presigis kun la subteno de la





Ministerio. Tiujn informilojn ni disdonis inter la kongresanoj ĉe la ELI-tablo dum la Movada Foiro kaj ankaŭ poste, dum la kongresa semajno. Ĉar ĉiu el ni devis deĵori ankaŭ ĉe alia tablo, mi petis de Anna, la ĉiama organizantino de la Movada Foiro, meti niajn kromajn tablojn apude, tiel ke maldekstre estis la tablo de BEL, dekstre la tablo de Internacia Kongresa Universitato (IKU), kaj meze inter ili la tablo de ELI. Dimanĉe, en la impona Solena Inaŭguro, Martha kaj mi denove renkontiĝis, ĉi-foje sur la podio. Kiel pasintjare en Kopenhago, mi prezentis la naciajn salutantojn (kune kun mia koleginino Maritza Gutierrez). Nome de Israelo salutis Martha, kiu invitis la kongresanojn al la Azia Kongreso kaj al la IJK de TEJO, okazontaj en Israelo en 2013.

Pli frue en la Inaŭguro, la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, legis la saluton de la Israela ambasadoro en Hanojo, kiu nome de la Ŝtato de Israelo bonvenigis al la Azia Kongreso kaj al la IJK okazontaj en Israelo, kio rikoltis multajn aplaŭdojn. Pli frue dum la tago mi havis la honoron sidi vidalvide kaj paroli kun la vicprezidantino de Vjetnamio. Mi donacis

al ŝi la IKU-libron

(broŝuro kun la tekstoj de ĉiuj prelegoj de la

Internacia Kongresa Universitato, kies solena

inaŭguro okazis samtage

posttagmeze. La sekvan tagon mi prelegis

kadre de la Kleriga Lundo, alia sukcesa program-iniciato de la lastaj jaroj, pri "Esperanto, Google kaj Maŝintradukado"; la salono estis plenplena. Daŭre dum la Kleriga Lundo mi partoprenis en programo pri Tibor Sekelj, organizita de mia malnova kroata amikino Judita Hudeček. Mi prelegis pri



la vojaĝoj kaj verkoj de Sekelj; en kelkaj el ili mi ja postsekvis liajn spurojn, kiel la grimrado sur Kilimanĝaro aŭ "Tempesto super Akonkagvo". Mardon okazis la kunveno de KAEM (Komisiono pri Azia Agado de UEA), kaj oni petis min detale prezenti la Azian Kongreson. Multaj interesiĝis pri la kotizo, kaj kvankam ni ankoraŭ ne ricevis la finajn prezojn de la kongresejo, mi riskis krude taksi, promesante ke la baza kotizo estos ĉ. 200 eŭroj (en Septembro mi kunmetis la buĝeton kaj sukcesis realigi tiun promeson). Merkredon okazis la tradicia tuttaga ekskurso. La plej populara celo estis prave la mirinda Ha-Long Golfo, sed ĉar mi jam vizitis ĝin dum vojaĝo al Vjetnamio antaŭ tri jaroj, mi elektis la ekskurson al la parfuma pagodo, kiu evidentiĝis esti belega. Fotoj de tiu rava ekskurso mi enretigis por la kun-vojaĝintoj:

<https://picasaweb.google.com/amri.nivut/ParfumePagodaVietnam> (simile videblas la UK-fotoj, kiuj logis multajn spektantojn en Facebook

[http://www.facebook.com/amri.wandel/photos\\_albums](http://www.facebook.com/amri.wandel/photos_albums), en "UK Esperanto Hanoi 2012"). Ĵaŭdon okazis en la Libroservo mia aŭtora duonhora.

Anstataŭ prezenti miajn verkojn, mi dediĉis ĝin al rakontoj kaj bildoj memore al Josi Ŝemer. Mirinde kiom da personoj konis kaj admiris lin: eble pro tio mia aŭtora duonhora ĉi-foje allogis pli da aŭskultantoj ol en antaŭaj jaroj. Posttagmeze



Boate al la Parfum-pagodo, UK Hanojo. Foto: Ba Jing Ke

imponis kaj bongustis la urba akcepto, kiu ne nur havis belan artan programon sed eĉ varman vesperanĝon. Vendrede mi denove prezentis la Azian Kongreson, en la kunveno pri Azia Agado. Posttagmeze, en la tradicia Aŭkcio lerte prezentita de Humphrey Tonkin, oni povis aĉeti la kongresnumeron unu en la Azia Kongreso. Por konkretigi tiun abstraktan vendaĵon, oni starigis apude la grandan afiŝon de la Azia Kongreso, kiun

ni uzis en la Movada Foiro kaj en la KAEM-kunveno. Dum la tuta semajno aktivis la budo de la 68-a IJK, kiu okazis tuj post la UK – samkontinente, samlande kaj eĉ samurbe. Pro tiu malofta koincido mi decidis ŝanĝi mian planon ekvojaĝi tuj post la fino de la UK kaj restis ankoraŭ du tagojn por iomete sperti ankaŭ la IJK-on.



Amri rakontas pri la historio de la IJK-flago dum la interkona balo en la IJK en Hanojo

La organizantoj bonvolis inviti min prelegi pri la historio de TEJO dum la interkona balo, dimanĉe vespere. La tagon ĝis la komenciĝo de la IJK mi utiligis por viziti Hanojon, kion mi ne sukcesis fari dum la kongresa semajno pro la densega programo kaj multaj taskoj (Komitat- kaj Estrarkunsidoj de UEA, IKU, Faka Agado, reklamado de la Azia Kongreso). Entute ni disdonis pli ol mil flugfoliojn de la Azia Kongreso. La grandan afiŝon kaj la restantan stoketon da flugfolioj (kiuj mencias ankaŭ la IJK-n de 2013 en Israelo) mi lasis en la IJK por Sergeo, kiu alvenis kelkajn horojn post mia forveturo, kaj daŭrigas la raportadon ĉi-sekve.

# La IJK en Hanojo

Sergo Meir Goren

En la ĉi-jara IJK en Vjetnamio, mi estis la sola israelano. Tial mi tute sole kaj memstare (eĉ se staris apude la granda afiŝo pri la Azia Kongreso) devis prezenti la ontan 69-an IJK-n en Israelo... El tio min savis, tamen, israela ĉokolado – la plej bona helpilo kiam oni bezonas elturniĝi el malfacila situacio. Sed mi ne bedaŭras – perdis tiuj kiuj ne ĉeestis. Des pli ke por mi tiu ĉi IJK estis iaspeca fermo de cirklo: en la jaro 2007, kiam la Kongreso okazis en Vjetnamio la unuan fojon, mi ne povis vojaĝi al ĝi, kaj ĝuste tiam TEJO ne sukcesis atingi kvorumon en sia komitata kunsido kaj ne estis elektita nova estraro.

La malnova, kvankam estus devinta plu-funkcii ĝis eventualaj elektoj, iom-post-iom malaperis; krizo trafis TEJO-n, kaj oni haste komencis serĉi novan generacion de estraranoj. Mi estis unu el tiuj, kiujn la Elekta Komisiono kontaktis, kaj post longa persvado kaj multaj hezititoj, mi donis mian jeson kaj tiel estis elektita fine de 2007 al la Estraro de TEJO. La ĉi-jaran Vjetnamian IJK-n mi decidis partopreni spite ajnan obstaklon; kaj jen mi atingis Hanojon kaj ankaŭ baldaŭan finiĝon de mia estraraneco en TEJO. La decidon influis ankaŭ la sento, ke temas pri donaco de Fortuno. La



IJK origine devis esti okazanta en Japanio – tamen, ĉirkaŭ la Novjaro 2011/12 la japanaj gejunuloj anoncis, ke ili ne kapablas aranĝi la Kongreson; kaj tute sensperta, kun nenio preta, sen sufiĉa tempo, Vjetnamia teamo informis, ke ili pretas transpreni la organizadon. Estas nun klare, ke malgraŭ ĉiuj evidentaj obstakloj ili brile sukcesis en sia tasko. Kvar knabinoj zorgis pri la tuta programo, instruis grupon de pli ol 30 helpantinoj, manĝigis kaj loĝigis nin. Iujn mankojn ili ombrigis per

luksa bankedo (kiu meritas apartan rakonton), per komuna tranoktado en kampadejo (150 homoj en unu halo), – kaj per neĉesiĝanta pluvo. Forgesu pri sekigo de viaj vestaĵoj; 82%-e humida aŭgusta Hanojo ne lasas al vi ŝancon preteratenti akvon, ĉie.

La IJK estis malgranda kaj sufiĉe leĝera – kio kutimas por landoj, kiujn multekostegas atingi. Sed tiaj kongresoj havas sian ĉarmon kaj apartan intiman etoson. Okazis lingva festivalo, prezentado de naciaj vestaĵoj, aŭkcio (kies gajno estis donacita al orfejo), admirado de HỒ Chí Minh, prelegoj pri la konferenco por daŭripova evoluo RIO+20 kaj aktiva agado de esperantistoj kadre de ĝi, kaj eĉ Esperanta diskoteko – post iom da ŝmirmono al la prizorganto de la ejo. Ambaŭ la malfermo kaj fermo de la kongreso estis tre solenaj, kun ĉeesto de Vjetnamiaj gravuloj. Tre mojosa

estis la du-taga vojaĝo al kampadejo en Ba Vì, kie vere ĉiuj partoprenantoj de IJK dormis kune, sur substernaĵoj. Ne okazis seriozaj prelegoj, sed anstataŭe diversaj ludoj kaj konkursoj. Post la manĝado oni kutime boatumadis aŭ biciklumadis per du-seĝaj bicikloj. La atmosfero certe

Sergeo Meir ricevas la IJK-flagon por Israelo



helpis al amikiĝo kaj malstreĉiĝo. Ankaŭ ĉi tien postkuris nin la pluvego, kaj dum la teama konkuro en la apuda arbaro, trafis nin skualo. Ne havante plu sekan makulon sur si, homoj eniris la kampadejan naĝejon kaj tie okazigis verŝajne la unuan en la historio kunnaĝadon (dumŝtorman!) de La Bambo.

Pri certaj aferoj neeviteble oni spertis kulturajn ŝokojn – eksterlandanoj samkiel vjetnamoj. Por la gastoj estis tre surpriza la fakto, ke por loĝi dum IJK, en ĉiu ĉambro 3 homoj havis nur 2 litojn. Dum por la orient-azianoj estis nekonceptebla la ebleco de dancado kun iu de alia sekso, des pli kisi lin aŭ ŝin survange. Sed spite tion, apenaŭ estis aŭdebla iu plendo. Certe helpis al tio la fakto, ke la vjetnama junularo estas tre ĉarma kaj verva, kaj plej grave – ili ankoraŭ ne perdis la iaspecan naivecon pri la baza bona karaktero de Esperantistoj, samkiel Vjetnamio ne estas jam infektita per agresa kapitalismo. Tiu perdis, kiu ne ĉeestis ĉi tiun IJK-on en Vjetnamio.



# Tri Internaciaj Festivaloj: 2011-2013

Amri Wandel

**Kio estas komuna al la tri lastaj jarŝanĝaj renkontiĝoj de la Internacia Festivalo (IF), en 2011, 2012 kaj 2013? Respondo: ĉiuj tri havis Israelan Vesperon kaj plurajn israelajn gepartoprenantojn.** En 2010/11 Josi partoprenis en la IF duan fojojn. Antaŭ lia pensiigo li ne facile povis vojaĝi dum la jarfino, kiu kutime ne estas feriotempo en Israelo. En 2011 ni estis triope: Josi Ŝemer, mi kaj Esti Saban, kun kiu mi preparis falaflon por la Israela Vespero. Ni kantis israelajn kantojn kune kun nia bona amiko Mikaelo Bronŝtejn, kaj instruis israelajn popoldancojn. Mi montris fotojn de la samjara Israela Kongreso en Cezareo kaj de la postkongreso ĉe la Morta Maro, Ejlat kaj Petra kaj invitis la aŭskultantojn al la sekva Israela Kongreso en Bejt-Ŝean. Du bonaj geamikoj – Dieter kaj Yoshie Kleemann decidis veni al Bejt-Ŝean kaj ilian raporton vi povas legi komence de la numero. Josi prelegis pri la hebrea lingvo kadre de la Internacia Vintra Universitato (IVU), kiun mi organizas en la IF jam la sesan jaron sinsekve. Josi, kiel talenta instruisto, logis amason da spektantoj. Dum la tradicia silvestra balo ni disdonis la atestojn al la kurs-finintoj. Josi estis feliĉa kaj jam ekplanis pri la sekva IF, sed bedaŭrinde lia sanstato malboniĝis, kaj la sekvan IF-on li ne povis partopreni. Anstataŭe venis al la IF en 2012, denove Esti, kun siaj du fratinoj Ruti kaj Pnina kaj la nevino Merav. La kvaropo de ekzotaj belulinoj rikoltis vastan admiron, kaj haltigis la IF-horloĝon en la momento 00:01, 2012-01-01, kiel videblas en la venonta paĝo kaj en la IF-hejmpaĝo <http://www.internacia-festivalo.de/>. Same kiel en la antaŭa jaro, la IF okazis en la urbo Xanten, Germanio, kun 120 partoprenantoj el 16 landoj (i.a. Armenio, Israelo, Rusio, Brazilo, Japanio). La plej eminenta



Josi donas AIS-ateston al Emmi Breuninger, kun prof. Quednau

partoprenanto estis mia bona amiko Ulrich Brandenburg, la ambasadoro de Germanio en Moskvo. Ulrich kaj mi konatiĝis dum la IJK en Münster, 1974, kaj tri jarojn poste, en 1977, kunorganizis la interŝanĝon inter niaj respektivaj junularaj E-organizoj, GEJ kaj JELI. Pro la proksimeco de Nederlando, la kadra temo estis “Benelukso”. Rilataj prelegoj estis “Du popoloj disigitaj de la sama lingvo” far Kristin Tytgat (Kiki), “La luksemburga – estiĝo de nacio kaj estiĝo de lingvo”, far Brian Moon, kaj Mikaelo Bronŝtejn interese prezentis la historion de la rilatoj inter Rusio kaj Benelukso. Aliaj interesaj prelegoj okazis ĉu kadre de Internacia Vintra Universitato ĉu ekster ĝi. Temis pri mia jam tradicia kurso pri astronomio, pri Vikipedio (far Ziko van Dijk) kaj etno-lingvismo (Armenio kaj ĝia lingvaro, far Ugo de Riu kaj Susanna Baghdasaryan). Entute rekorda nombro de 36 kandidatoj sukcesis en ekzameno de AIS kaj ricevis siajn atestojn dum la silvestra balo, kiel en la antaŭa jaro. La tuttaga ekskurso apartenis al la kadra temo: temis pri vizito al Nimego (Nijmegen), lerte ĉiĉeronata de “kapitano” Kees Ruig kaj la prezidanto de la loka grupo. Ili kondukis nin tra la malnovaj stratoj kaj fine al ŝipo, kie ni krozadis manĝante krespojn. Inter la vesperoj elstaris tiuj du vesperoj kun Georgo Handzlik, kiu montris siajn profesiajn talentojn de kabareda kantisto.



Ĉi-jare la IF okazis en Dortmund, jam la 29-an fojon, kiel ĉiam, sub la organizado de la mitologia iniciatinto Hans-Dieter Platz, pli konata kiel HDP. Alighis 88 personoj el 16 landoj. Ĉi-foje venis nek Josi, kiu bedaŭrinde ne plu estas inter ni, nek Esti kiu ne povis vojaĝi pro malsano. "Kompense" aliĝis mia edzino Gila. Samkiel en la du pasintaj fojoj, ni prezentis Israelan vesperon sed la etoso estis miksitaj kun malĝojo: komence de la vespero okazis memor-programo pri Josi, kiun multaj el la

IF-anoj konis de liaj du partoprenoj en la IF, aŭ de liaj judaj hunuraĵoj. En la dua parto mi montris bildojn de la pasintjara Israela Kongreso kaj prezentaĵon pri la Azia Kongreso okazonta en Jerusalemo dum Aprilo. Sekve Gila surprizis la spektantojn per profesia ventro-danco kiu rikoltis longan aplaŭdon, ni kantis "Hava Nagila" kun Mikaelo Bronŝtejn, kaj instruis israelan popoldancon. Fine ni servis israelajn manĝaĵojn, sed anstataŭ falaflon ni ĉi-foje preparis dolĉan deserton "sahleb".

Dum la tuttaga ekskurso al la Ruhr-regiono, ni vizitis la faman planetarion de Bochum kaj mi klarigis pri ĝia astronomia ekspozicio. La planetarian prezentaĵon ni tamen ne spektis, ĉar ĝi estis nur en la germana. Anstataŭe la interesigantoj povis spekti esperantlingvan planetarian prezentaĵon en mia IVU-prelego "La planetario: la granda astronomia spektaklo". Duan

IVU-prelegon mi faris pri "Esperanto, Google kaj maŝintradukado", simila al tiu kiun mi prezentis en la UK en Hanojo. Krome estis en IVU profesiaj kursoj pri "La violono" kaj pri "Sociaj retoj: teorio, historio, perspektivo". Entute 37 el la partoprenintoj sukcese faris la ekzamenojn kaj ricevis AIS-atestojn dum publika ceremonio en la antaŭ-lastata vespero. Inter la aliaj programeroj estis prelegoj pri la ĉeftemo – "Komputilo – Interreto", kiel "Etiko de



retumado", kaj "Sinjorino informo". Oni povis partopreni aliajn programerojn ekster la ĉeftemo, kiel la laborgrupo de Gila pri "Renoviĝo okaze de la jarŝanĝo", kaj mia prelego pri Birmo (*Myanmar*). Dum unu tago mi vizitis la paralelan aranĝon "Novjara Renkontiĝo", en Xanten, ĉe la sama gastejo kie IF okazis pasintjare. Tie estis pli ol 150 personoj ĉ. 60 el ili infanoj. Mi prelegis tie pri la Azia Kongreso kaj pri Google kaj maŝin-tradukado, renkontis multajn geamikojn, inter ili Jomo kiu koncertis vespere. La plej impona espero estis kiel ĉiam la Silvestra Balo, kun riĉa bufedo kaj anoncado de la Novjaro laŭ la diversaj horzonoj de la partoprenantaj landoj. Venontjare espereble venos pli da israelanoj al la 30-a jubilea IF, kiu estos ankaŭ la lasta, kiun HDP organizos.

# La 79-a Itala Kongreso de Esperanto

Yael Shelach

Ĉi-jare la 79-a Itala Kongreso okazis la 16-25 de Aŭgusto, en la urbo Mazaradelvalo, en Sicilio. En la kongreso partoprenis pli ol 330 samideanoj el 32 landoj, el Israelo partoprenis 5: Gian Piero, Adriana, Elvire, Esti kaj mi, Yael.

Mazaradelvalo situas en la provinco Trapani. Mazaradelvalo havas

kelkajn antikvajn distriktojn, estas tre plezure promeni tra la mallarĝaj stratetoj en la araba kvartalo, aŭ apud la maro al la granda promenejo..

Ĉiunokte okazis en la granda placo de Mazaradelvalo koncerto – tiamaniere la loĝantoj havis eblecon “gustumi” Esperanton ... Multe da afiŝoj kaj banderoloj anoncis la kongreson en la urbo.



Dimanĉe okazis la Solena Inaŭguro de la kongreso, Mi tre ĝuis kunveni



kun homoj, kiujn mi jam konas de antaŭaj kongresoj kaj ekkoni novajn geamikojn...La temo de la kongreso estis “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof”. La kongreso proponis riĉan programon: prelegojn, seminariojn, ekskursojn, trinivelajn Esperanto-kursojn kaj ankaŭ rapidan kurson de

la Itala lingvo.

Mi tre amas ekskursojn, pro tio mi ekskursis multe dum la kongreso.. Mi ĝuis la viziton al la urboj Palermo, Erice, Trapani, Agriĝento kaj al la Valo de la Temploj; kaj la kongreson entute – malgraŭ la varmego.

Mi jam esperas partopreni mian venontan kongreson – la 7-an Azian kongreson en Jerusalemo, dum Aprilo 2013.

## Kiel mi fariĝis bapto-patro

**Avraham (Rami) Ŝlain**

*Reviziis Eldad Salzman*

En la somero de 1987 mi partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Krakovo, Pollando. Ni estis kvin israelanoj inter preskaŭ 1,000 partoprenantoj. Je la unua tago mi staris en la enireja halo. Paro da gejunuloj proksimiĝis al mi.

"Ĉu vi estas israelano?" – demandis la ridetanta ĉarma junulino.

"Jes," – mi respondis. "De kie vi estas?"

"Ni estas el la urbo Perm en la Ural-montaro en Sovetunio," – diris la junulo.


"Ni estas judoj," – diris la junulino, surprize...

"Tre agrable. Mia nomo estas Rami."

"Mi estas Ĵenja, kaj li estas mia edzo Aleks," – ŝi diris, kaj ni interpretis la manojn.

"Ni atingis la kongreson kun la tutlanda soveta delegacio, po du geamikoj el ĉiu regiono," – rakontis Aleks.

"Ĉu estas multaj judoj en Perm?" – mi





demandis, "Ĉu vi estas kontentaj tie?" "Kompreneble, ke ni estas kontentaj," – respondis Ĵenja, "Ĉio en ordo, ni bone vivas."

"Ĉu estas multaj judoj en Perm?" – mi demandis, "Ĉu vi estas kontentaj tie?" "Kompreneble, ke ni estas kontentaj," – respondis Ĵenja, "Ĉio en ordo, ni bone vivas."

"Se ekestus premo, ĉu vi volus elmigri al Israelo?"

"Kial migri? Ni vivas bone..." – diris Aleks.

Iom poste evidentiĝis, ke en ilia grupo estis ankaŭ du politikaj inspektoroj.

La morgaŭan tagon mi elprenis ĉiujn memoraĵojn, kiujn mi kunportis por disdoni, albumojn de Israelaj koloraj fotoj, kasedojn de hebreaj kantoj ktp. Mi donacis ĉiujn al miaj novaj geamikoj. Mi petis ilin prezenti tiujn al ĉiu judo kiun ili konas hejme. Ni renkontiĝis kelkajn fojojn dum la Junulara Kongreso kaj poste, dum plia semajno, en la Universala Kongreso en Varsovio. Je la fino ni sentis nin kiel malnovaj amikoj, kun la promeso reteni la kontakton.

\* \* \*

Du jaroj pasis. Mi ricevis leteron de Aleks. Li rakontis iomete pri ilia vivo kaj demandis, kion opinias la israelanoj pri la elmigrado de judoj el Ruslando. Mi tuj skribis reen pri la profunda volo akcepti kaj absorbadi novajn alvenantojn. Ni interŝanĝis leterojn. Li petis, ke mi interesiĝu pri la ebleco viziti Israelon por medicina konsultado, ĉar ilia 3-jaraĝa filo suferas je serioza sanproblemo. Mi konsultis specialistojn, kaj skribis ke la proceduro kaj la helpo al turistoj estos multekosta - sed novaj enmigrintoj tute ne pagas...

Intertempe eksplodis la Golfmilito. Ĵenja estis zorgema, tie en Perm. Ŝi atendis tutan tagnokton je la viclinio ĉe la publika telefono por demandi nin kiel ni fartas... Iom da tempo poste ni ricevis anoncon ke ili decidis elmigri al Israelo, kune kun sia filo kaj la patrino de Ĵenja. Ili petis nin trovi lueblan loĝejon, apude al ni, en Givatajim.

\* \* \*

Mia entuziasma edzino kaj mi mobiliziĝis je la operacio de absorbado. Ni studis ĉiujn leĝojn, regulojn kaj la bonifikojn por novaj enmigrintoj; ni serĉis kaj ekzamenis loĝejojn. Mi petis la estraron de ELI kaj ricevis

permeson uzi ties apartamenton, ĝis kiam la alvenontoj eniros sian luitan loĝejon. Unu semajnon antaŭ la alveno, mia edzino estis en granda kunveno de instruistoj de Ramat-ĝan kaj Givatajim. Ŝi disdonis al la partoprenantoj folion, en kiu ŝi rakontis pri la alvenonta familio, kun peto pri kontribuoj de mebloj kaj hejm-instrumentoj por ili. La samon ni petis de niaj konatoj. Alvenis plena listo da donacoj: mebloj, fridujo, litoj, sofo, tabloj, seĝoj ktp., kun adresoj kaj telefon-numeroj.

En Majo 1991, dum vendreda vespero, la flughaveno estis okupita pri la alveno de "Operaco Ŝlomo" – en tiu nokto oni venigis multajn etiopiajn judojn. Niaj gastoj estis veturigitaj al hotelo por reveni la morgaŭan vesperon kaj fini la enirprocedurojn. La morgaŭan tagon mi elprenis ilin el la hotelo al nia hejmo kaj ni manĝis kune la sabatan tagmanĝon. Inter Ĵenja kaj mia edzino ekkreskis granda amikeco. Mi estis la tradukanto de kaj al Esperanto.

Posttagmeze mi veturigis ilin al la provizora loĝejo de la nia Esperanto-Ligo, por ke ili sciu kien veni nokte, post la reveno el la flughaveno, kaj dimanĉe mi prenis ilin vidi la loĝejon, kiun ni trovis en Givatajim. Ili konsentis lui ĝin, pere de la absorba bonifiko. Dum la renkontiĝo kun la posedanto kaj ties advokato, mi estis la tradukanto por subskribo de la kontrakto. Tiam komenciĝis intensa telefona operaco por kolekti la promesitajn donacojn, meblojn kaj hejm-instrumentojn, laŭ la listo kiun ni havis. Samtempe ni prizorgis la transportadon, kun helpo de amikoj. Du semajnojn poste la apartamento estis sufiĉe bone ekipita por loĝado. Ni helpis ilin aĉeti indajn produktaĵojn kaj manĝaĵojn por komenci propran vivon.

Dum la unuaj semajnoj ni veturis kune al la diversaj Ministerioj: pri la Internaj Aferoj, pri la Enmigrabsorbado; al Malsanula Kaso, Nacia Asekuro, banko kaj aliaj. Mi mallongigis, helpe de Esperanto, la procedojn de absorbado. Bonŝance tiutempe mi estis libera pro sabata jaro, kaj mi povis akompani ilin kvazaŭ ili estis miaj gefiloj.

Dum Julio 1992 Ĵenja naskis sian duan filon, la nova israelnaskito (*Cabar*). Ni helpis aranĝi kaj prepari la cirkumcidan tradician ceremonion kaj la postan bankedon; mi akceptis la honoron esti la **baptopatro** de la novnaskito. Tiu eksinfano, Beni, servas nun en la israela armeo.

La tempo pasis kaj ni pli kaj pli forlasis la uzon de Esperanto kaj ekuzis hebrean "facilan" lingvon. Niaj renkontiĝoj malpliigis, ĝis la renkonto-

nivelo de ordinaraj geamikoj. Nia proksimeco kaj amikeco daŭras, malgraŭ la fakto, ke post kelkaj jaroj ili translokiĝis al Aŝdod. Eĉ nun Ĵenja diras, ke mia edzino estas ŝia dua patrino.

Tiu agado estis por mi la plej granda rekompenco pro la fakto, ke mi lernis Esperanton en 1967.

La vera "kulpulo" pri tiuj travivaĵoj estis ne alia ol...

**Doktoro Zamenhof** kaj... la lingvo kiun li kreis, **Esperanto**.


## Kiam israelanoj silentas

**Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki)**

---

### Enkonduko

Aŭdinte la titolon de tiu ĉi prelego, kelkaj el vi eble demandas vin nun, ĉu israelanoj vere silentas. Mia respondo estas, kompreneble, "certe jes", kaj bedaŭrinde en ĝenaj manieroj en



certaj kazoj. Mi loĝis en Israelo la unuan fojon inter oktobro 1988 kaj julio 1993 por mia doktoreco pri hebrea lingvistiko ĉe la Hebrea Universitato de Jerusalemo. Ekde aŭgusto 2004 mi denove loĝas ĉi tie, laborante kiel docento kaj poste supera docento pri hebrea lingvistiko ĉe Universitato Bar-Ilan. Kiam mi ankoraŭ loĝis ĉi tie kiel gasto, mi naŭve pensis, ke Israelo estas rozkolora ĝardeno, tamen kiel israela civitano, kiu eĉ perdis civitanecon de sia naskiĝlando, mi nun vidas klare ankaŭ negativajn socikulturajn aspektojn ĉi tie, kvankam ankaŭ estas, kompreneble, pozitivaj aferoj. Post kiam mi forlasis Israelon en julio 1993 kaj reloĝis en Japanio, mi surpriziĝis renkonti tiel multajn socikulturajn problemojn tie. Inter tiuj problemoj estis "japana silento" kaj "japana malsilento". Multaj homoj tie silentis kiam mi anticipis, ke ili ne

silentu, kaj ili malsilentis kiam mi anticipis, ke ili silentu. Multaj el vi, kiuj konatiĝis kun japanaj Esperantistoj, bone scias, ke multaj el ili simple ne esprimas siajn opiniojn kaj sentojn rekte kaj ofte plendas kontraŭ vi preter vi. Tio ege ĝenis min kaj mi ofte plendis rekte kontraŭ tiaj homoj.

Retrospekive mi komprenas nun tre klare, kial mi trovis neniun postenon ĉe iu ajn japana universitato. Tamen pro tio mi trovis postenon ĉe israela universitato, kaj mi tre ĝojas pri tio. Do vi povos imagi mian ĝojon, kiam mi ekloĝis en Israelo denove en aŭgusto 2004. Tamen mia ĝojo ne daŭris tiel longe. Mi baldaŭ trovis, ke fakte multaj homoj ĉi tie malsilentas kiam mi anticipas, ke ili silentu. Ekzemple, ili parolas tre laŭte per portebla telefono kaj eĉ pri privataj aferoj publike. Feliĉe, mi iel alkitimigis min al "israela malsilento", sed "israela silento" ekĝenis min kaj mi eĉ ekbatalis kontraŭ ĝi, kvankam mi scias tre bone, ke mia batalo estas perdita de la komenco. Per "israelanoj" mi intencas ĉi tie ĉefe tiujn homojn, kiuj naskiĝis en Israelo aŭ enmigris ĉi tien en juna aĝo. Kompreneble, ne ĉiuj el ili kondutas laŭ mia jena ĝeneraligo. Tamen mi povas diri, ke se oni komparas ilin kun tiuj de aliaj kulturaj fonoj, pli multaj de israelanoj silentas multe pli ofte almenaŭ en la jenaj kvar kazoj, ekzemple ol tiuj kun japana, rusa aŭ usona kultura fono.

Jen la kvar kazoj de tipa "israela silento", kontraŭ kiuj mi ne ankoraŭ rezignis batali, por ke Israelo, mia nova hejmlando, fariĝu pli agrabla loko, speciale en interhomaj rilatoj:

- 1) silenti, ne plendante kontraŭ certaj kazoj de maljusteco;
- 2) silenti, ne dankante en certaj cirkonstancoj,
- 3) silenti, ne petante pardonon en certaj cirkonstancoj;
- 4) silenti, ne respondante al certaj sinceraj demandoj.

Mi preparis ilin kun ironio, do mi esperas, ke ankaŭ vi komprenos ilin kun humuro. Fakte, mi sentis, ke mi fariĝis vera israelano, kiam mi trovis min plendanta, eĉ konstante, pri israelaj socio kaj kulturo. Nun mi klarigos ilin kun kelkaj ekzemploj.

### **Tipa israela silento 1: silenti, ne plendante kontraŭ certaj kazoj de maljusteco**

La unua kazo de "israela silento" estas silenti, ne plendante kontraŭ certaj kazoj de maljusteco. Antaŭe mi pensis, ke israelanoj plendas ĉiam kaj ĉie, sed evidentiĝas, ke mieraris. Mi trovis kelkajn cirkonstancojn, kiam oni ne plendas kaj preferas silenti. Temas ĉefe pri certaj kazoj de maljusteco, aŭ socia aŭ privata. Jen ekzemploj. Kiel vi ĉiuj scias, tiel multaj aŭtomobilistoj hupas surstrate senpacience. Mi demandadas min, kiamaniere ili uzas la tiel ŝparitan tempon, kaj ĉu ili mem venas al

renkontiĝoj ĝustatempe. Persone mi konsideras la rabon de tempo kiel la plej teruranton de rabo post la rabo de vivo. Tamen ŝajnas, ke ne multaj homoj konscias pri tio, kaj preskaŭ ĉiu silente toleras la rabon de tempo far tiuj, kiuj malfruiĝas. Oni povas rabi

la tempon de aliuloj ankaŭ en aliaj formoj. Ekzemple, oni povas rabi ilian tempon, glitigante sin en vicon. Mi permesas neniu ajn rabi la tempon de mia atendado tiel, kaj se iu religia judo aŭdacas fari tion, mi ne hezitas demandi lin, kion li lernis de la torao. Tamen bedaŭrinde mi apenaŭ vidas homojn, kiuj plendas kontraŭ tiaj rabistoj de la tempo, kaj ili simple silentas.

### **Tipa israela silento 2: silenti, ne dankante en certaj cirkonstancoj**

La dua kazo de "israela silento" estas silenti, ne dankante en certaj cirkonstancoj. Povas esti, ke tio okazas nur al mi. Ĉiu-okaze, mi konstante ricevas multajn demandojn kaj de miaj studentoj kaj de multaj aliaj homoj, kiujn mi eĉ ne konas persone. Mi ĉiam respondas tuj, kaj kompreneble mi ne respondas por ricevi iliajn dankojn. Sed se mi vidas, ke la plejmulto de ili nek konfirmas la ricevadon de miaj respondoj al iliaj demandoj nek dankas pro tio, mi ne povas ne demandi min, ĉu mi devis malŝpari mian tempon por tiuj homoj, kiuj ne havas eĉ minimuman etiketon. Ĉu ankaŭ vi renkontas tian israelan silenton? Se jes, kiel vi sentas kaj reagis? Kompreneble, mi ne plendas kontraŭ tia silento, sed mi sentas, kvazaŭ mi estus bankaŭtomato, kaj en la venonta fojo mi ĝenerale ignoras demandojn de tiuj homoj.

### **Tipa israela silento 3: silenti, ne petante pardonon en certaj cirkonstancoj**

La tria kazo de "israela silento" estas silenti, ne petante pardonon en certaj cirkonstancoj. Eble pri tiu ĉi tipo de israela silento vi ne bezonas "kommentaron de Raŝi". Mi konas sufiĉe multajn israelanojn, inkluzive de miaj geamikoj, kiuj ja pardonpetas. Tamen aliflanke mi ankaŭ renkontas sufiĉe multajn homojn, kiuj ne pardonpetas. Mi ne certas, se tia silento estas pli severa, kiam ĝi estas privata aŭ kiam ĝi estas publika. Min pli ĝenas manko de pardonpeto, do silento, en publikaj cirkonstancoj. Do kiam mi anticipas publikan pardonpeton sed renkontas absolutan silenton?



Jen ekzemploj. En nia lando ni neniam povas kredi la horaron de aŭtobusoj. Ili konstante malfruiĝas, eĉ en la unua stacio. Kvankam mi scias, ke ĝenerale la ŝoforoj ne kulpas, mi neniam aŭdas ilian pardonon, kaj anstataŭe ili simple silentas, aŭskultante sian ŝatatan muzikon, kiu ofte ĝenas multajn pasaĝerojn. Private mi renkontas tiun ĉi tipon de israela silento konstante. La plej severa, miaopinie, estas, ke oni ne petas pardonon, kiam oni rompas siajn permesojn. Tio okazas al mi eĉ kun tiuj, kiujn mi konsideris kiel miajn geamikojn, kaj kun aliaj honorindaj homoj. Komprenible, mi ne restos en kontakto kun tiaj senrespondecaj silentuloj. Parenteze, estas ĉi tie ankaŭ alia socikultura demando, t.e., kial tiel multaj homoj faras promesojn, kiujn ili ne povas plenumi.

#### **Tipa israela silento 4: silenti, ne respondante al certaj sinceraj demandoj**

Kaj la kvara kazo de "israela silento" estas silenti, ne respondante al certaj sinceraj demandoj, kaj tiu ĉi silento vere frenezigas min. Ĉu vi volas ekperimenti? Ne tiel bona ideo, mi timas. Almenaŭ kun mi, tiel multaj homoj ĉi tie silentas, kiam ili estas petitaj respondi, ekzemple, al tiaj sinceraj demandoj kiel la jenaj:

- Ĉu vi venos al nia venonta renkontiĝo, kien vi mem petis min inviti vin?
- Ĉu vi povos prelegi en nia venonta kongreso, konferenco aŭ kunveno?
- Ĉu vi povos kontribui artikolon por nia revuo aŭ libro?
- Ĉu vi povos komenti pri mia artikolo, kiun vi petis min kontribui al via revuo aŭ libro?
- Ĉu vi povos konfirmi, ke vi ricevis mian artikolon, kiun vi petis min kontribui al viamrevuo aŭ libro?

#### **5 Resumo**

En tiu ĉi prelegeto mi nur montris kvar kazojn de "israela silento", sed mi ne povis klarigi kial sufiĉe multaj israelanoj silentas en tiuj kazoj, simple ĉar mi mem ne silentus tiam, do mi ne komprenas ilin kaj ilian silenton. Mi tre ĝojus, se iu inter vi povus klarigi unu fojon por ĉiam la logikon de tia "israela silento" kaj la pensmanieron preter ĝi. Mi nur esperas, ke vi ne koleris kontraŭ mi pro tiu ĉi prelego, sed se hazarde jes, vi povas silenti kun mi. Koran dankon pro via pacienco aŭskulti min silente ĝis la fino.

# Zamenhof, la kuracisto

**Michal Amir**

---



Mi volis skribi ion pri Zamenhof, io kiu ankoraŭ ne estis skribita. Kaj mi rememoris, ke surprize, mi ne trovis en lia biografio multajn detalojn pri li kiel okulisto. Ĉar la vespero estas plena de programeroj, mi rakontos pri Zamenhof kiel kuracisto, per nur du mallongaj rakontoj: unu de Zamenhof mem, kaj la dua estos anekdoto de Kabe.

Zamenhof studis medicinon unue en Moskvo kaj poste en Varsovio, kaj finis en la aĝo 26a. Li iĝis fakulo pri okulkuracado, interalie, en Vieno.

Poste, li revenis al Varsovio, kaj kuracis la plej malriĉajn judojn.

El artikolo de "Litova Stelo" en 1998, skribita de Petras Celiauskas:

Ĝus post kiam Ludoviko Zamenhof ricevis sian diplomon, en 1885, lia fratino Fania, kiu loĝis en Veisiejai, petis urĝan helpon de li. Ŝia edzo Aleksandro Pilkover, la loka apotekisto, grave malsaniĝis pro ia cerba malsano. Tiam kiam Ludoviko komprenis ke en la urbeto ne estas kuracisto, li decidis tie komenci kuracistan praktikon.

Nun permesu al mi citi Zamenhofon mem:

"Praktikinte tie en la daŭro de 4 monatoj, mi konvinkiĝis, ke mi por la komuna medicina praktiko tute ne taŭgas, ĉar mi estas tro impresiĝema kaj la suferoj de la malsanuloj (precipe de mortantoj) tro multe min turmentis. Tiam mi revenis Varsovion kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan, nome la malsanojn de okuloj. Mi laboris en la daŭro de 6 monatoj en la okulista apartaĵo de unu Varsovia malsanulejo, poste mi lernis kelkan tempon en la klinikoj de Vieno (Aŭstrujo) kaj en fino de 1886 mi komencis okulistan praktikadon en Varsovio. Tiam ni konatiĝis

kun mia nuna edzino, Klara Zilbernik el Kovno (ŝi tiam gastis ĉe sia fratino loĝanta en Varsovio). La 9-an de aŭgusto 1887 mi edziĝis."

Do, Zamenhof loĝis en Veisiejai nur dum kvin monatoj, kaj poste li laboris en Varsovia hospitalo.

Alian rakonton skribis la fama esperantisto Kabe – Kazimierz Bein - en 1903.


Post kiam li legis multe da materialo en Esperanto kaj bone lernis la lingvon, li pensis: "Kia diablo estas tiu Esperanto, kiun faris en Varsovio iu D-ro Zamenhof, okulisto same kiel mi?"

Li jam libere komprenis tekstojn sen helpo de vortaro, kaj decidis ekkoni la kreinton de la lingvo. Do li iris al Doktoro Zamenhof.

Mi denove petas citi, ĉar Kabe priskribis ĝin bele kaj kun emocio:


"La D-ro akceptis la malsanulojn de la 4a ĝis la 6a horo. Do mi venis tuj post la 6a. La atendejo estis ankoraŭ plena kaj mi devis esti pacienca preskaŭ

unu horon.  
Fine eliris el la kabineto la lasta paciento, kaj kun batanta koro mi min prezentis al la Majstro. D-ro Zamenhof estis jam iom laca, sed eksciinte



pri la celo de mia vizito, li tre afable akceptis min, kaj ni komencis esperante interparolon pri Esperanto. Mi konstatis kun plezuro, ke sen iu ajn peno mi komprenas ĉion; ĉu D-ro Zamenhof same facile komprenis min, mi ne scias, sed mi iom dubas, ĉar de mia konvertiĝo pasis apenaŭ unu semajno. La simpleco kaj natureco de la manieroj de l' Doktoro tute ĉarmis min; kun streĉita atento mi aŭskultis ĉiun lian vorton kaj mi decidis, ke mi pli ofte ... aĉetos esperantajn broŝurojn kaj librojn. Je la 8a horo D-ro Zamenhof komencis oscedi. Timante, ke mi tedis lin, mi tuj lin adiaŭis kaj foriris. Mi ankoraŭ ne sciis tiam, ke nia Majstro ĉiam kaj ĉie oscedas vespere; mi tion eksciis nur poste kaj mi trankviliĝis. "Bone", pensis mi, "ne mi estis la kulpo".

Mia mallonga prelego estis nur por memori al ni, ke Zamenhof, kiu kreis nian belan Esperanton, estis ankaŭ homo kiel ĉiuj, kaj kiel ĉiuj, ankaŭ li havis sian profesion, ĉar li devis zorgi ne nur pri la tuta homaro, sed ankaŭ pri sia familio.



“**D-ro L. Zamenhof** loĝas nun en **Przejazd** n-ro 9, akceptas okulmalsanulojn ĉiutage: De la 9-10 matene kaj de la 4-6 posttagmeze.”

[Traduko el la jida]

Reklamo en gazeto “Hacefira”, Varsovio, la 26-an de aŭgusto 1887.

Mi tre dankas al Doron, kiu helpis al mi trovi artikolojn en la interreto, kaj korektis miajn erarojn en Esperanto.

# La graveco de seriozeco (sceno)

Oscar Wilde (trad. Doron Modan)

*Dum la Landa Kunveno de ELI, kiu okazis la 18-an de decembro 2012, Enrica Arbib kaj Doron Modan prezentis la ĉarman scenon de la aristokrata patrino kiu intervjuas potencialan edzon por sia filino, el "The Importance of Being Earnest" de la fama angla verkisto Oscar Wilde [Oskar Ŭajld]. Tio estas originala traduko de Doron, malsama de la klasika traduko de Wiliam Auld (1987) "La graveco de la Fideligo" (vidu la bildon sube). AW.*



Doron kaj Enrica ludas dum la kunveno

**Lady Bracknell.** [Sidiĝante.] Vi povas sidiĝi, Mr. Worthing.

[Serĉas kajereton kaj krajonon en sia poŝo]

**Jack.** Dankon, Lady Bracknell, mi preferas stari.

**Lady Bracknell.** [Kun kraĵono kaj kajereto en la mano.] Mi sentas min esti devigata diri al vi, ke vi ne aperas en mia listo de meritaj junaj viroj, kvankam mi havas la saman liston kiel la listo de la kara Duchess of Bolton. Ni laboras kune, fakte. Tamen, mi estas sufiĉe preta enigi vian nomon, kaze ke viaj respondoj estos tiaj, kiajn amanta patrino postulas. Ĉu vi fumas?

**Jack.** Nu, jes, mi devas konfesi ke mi fumas.

**Lady Bracknell.** Mi ĝojas aŭdi tion. Viro devas ĉiam havi iuspecan okupon. Estas vere tro multaj nenio-farantaj viroj en Londono





nuntempe. Kiom aĝa vi estas?

**Jack.** Tridek ok.

**Lady Bracknell.** Tre bona aĝo por edziĝi! Mi ĉiam opiniis, ke viro kiu deziras edziĝi, devas scii aŭ ĉion aŭ nenion. Kion el tiuj vi scias?

**Jack.** [Post ioma hezitado.] Mi scias nenion, Lady Bracknell.

**Lady Bracknell.** Mi estas kontenta aŭdi tion. Mi ne aprobas ion ajn, kio intervenas kun natura malscio. Malscio estas kiel delikata ekzota frukto; tuŝu ĝin kaj la florado malaperos. La tuta teorio de moderna edukado estas tute nestabila. Feliĉe, en Anglujo, almenaŭ, edukado rezultas en neniu ajn efiko. Se ĝi bone rezultas, ĝi kaŭzus seriozan danĝeron al la supera societo. Kio estas via enspezo?

**Jack.** Inter sep kaj ok miloj jare.

**Lady Bracknell.** [Notas en la kajero.] En tero, aŭ en investoj?

**Jack.** En investoj, ĉefe.

**Lady Bracknell.** Tio estas kontentiga. Se temas pri la devoj pri kiuj oni atendas de iu dum lia vivo, kaj ankaŭ pri la devoj atendataj de li *post* lia vivo, tero ĉesis esti ĉu profito ĉu plezuro. Ĝi donas pozicion, sed malebligas prezervi ĝin. Jen ĉio direbla pri tero.

**Jack.** Mi havas eksterurban domon kun iom da tero, kompreneble, alkroĉita al ĝi, ĉirkaŭ 6 kilometroj, mi kredas; sed mi ne dependas je ĝi por mia vera enspezo. Fakte, la neleĝaj ĉasistoj estas la solaj, kiuj iom povas profiti de ĝi.



Amuzitaj spektantoj ĝuas la teatraĵon dum la Zamenhofa vespero

**Lady Bracknell.** Eksterurba domo! Kiom da ĉambroj? Nu, tiu punkto povas klariĝi poste. Vi havas ankaŭ enurban domon, mi esperas. Oni ne povas postuli, ke knabino kun simpla, ne difektita naturo kiel Gwendolen, loĝu en la vilaĝo.

**Jack.** Nu, mi posedas domon en Belgrave Square, sed ĝi estas luigata jare al Lady Bloxham. Kompreneble, mi povas ricevi ĝin iam ajn, kun antaŭanonco de ses monatoj.

**Lady Bracknell.** Lady Bloxham? Mi ne konas ŝin.

**Jack.** Ho, ŝi tre malmulte ĉirkaŭiras. Ŝi jam estas sufiĉe aĝa.

**Lady Bracknell.** Ha, nuntempe aĝo ne estas garantio por respektinda karaktero. Kiu numero en Belgrave Square?

**Jack.** 149.

**Lady Bracknell.** [Skuas sian kapon.] La malmoda flanko. Mi sciis, ke estos io. Tamen, tio estas facile ŝanĝebla.

**Jack.** Ĉu vi celas la modon, aŭ la flankon?

**Lady Bracknell.** [Severe.] Ambaŭ, se necesas, mi supozas. Kio vi estas politike?

**Jack.** Nu, mi timas ke mi ne estas politika, mi estas liberala.

**Lady Bracknell.** Ho, ili konsideriĝas kiel konservativuloj. Ili vespermanĝas kun ni. Aŭ venas en la vesperoj, almenaŭ. Nun al malpli gravaj aferoj. Ĉu viaj gepatroj vivas?

**Jack.** Mi perdis ambaŭ miajn gepatrojn.

**Lady Bracknell.** Perdi unu el la gepatroj, Mr. Worthing, povas esti konsiderata malbonŝanco; perdi ambaŭ aspektas kiel malatento. Kiu estis via patro? Li evidente estis viro iom riĉa. Ĉu li naskiĝis en tio, kion la radikalaj gazetoj nomas komercaj cirkloj, aŭ ĉu li kreskis en la sfero de aristokratuloj?



Enrica kiel Lady Bracknell

**Jack.** Mi timas, ke mi ne vere scias. La fakto estas, Lady Bracknell: mi diris ke mi perdis ambaŭ miajn gepatrojn. Estus pli proksime al la vero diri, ke miaj gepatroj verŝajne perdis min. Mi ne vere scias kiu mi estas laŭnaske. Mi estis... nu, mi estis trovita.

**Lady Bracknell.** Trovita!

**Jack.** La karmemora Mr. Thomas Cardew, maljuna ĝentelmano, kun karaktero tre karitata kaj simpatia, trovis min, kaj donis al mi la nomon Worthing, ĉar li hazarde havis unuaklasan bileton al Worthing en sia poŝo tiam. Worthing estas loko en Sussex. Ĝi estas ĉe-mara ripozejo.

**Lady Bracknell.** Kie tiu karitata ĝentelmano, kiu havis unuaklasan bileton al tiu ĉe-mara ripozejo, trovis vin?

**Jack.** [Serioze.] En mansako.

**Lady Bracknell.** Mansako?

**Jack.** [Tre serioze] Jes, Lady Bracknell. Mi estis en mansako – iom larĝa, nigra leda mansako, kun man-teniloj – ordinara mansako fakte.

**Lady Bracknell.** En kiu lokalo tiu Mr. James, aŭ Thomas, Cardew ekvidis tiun ĉi ordinaran mansakon?

**Jack.** En la gardero de "Victoria Station". Ĝi estis donita al li erare anstataŭ la lia.

**Lady Bracknell.** La gardero en Victoria Station?

**Jack.** Jes, la linio al Brighton.

**Lady Bracknell.** La linio tute ne gravas. Mr. Worthing, mi konfesas ke mi sentas iom konfuzita pri tio, kion vi ĵus rakontis al mi. Naskiĝi, aŭ almenaŭ troviĝi, en mansako, ĉu kun man-teniloj aŭ sen ili, ŝajnas al mi elmonro de malrespekto al la ordinara familia deco, kio memorigas onin



pri la plej troigaj kutimoj de la Franca Revolucio. Kaj mi imagas, ke vi scias kien kondukis tiu bedaŭrinda movado. Koncerne la lokalon en kiu la mansako estis trovita: garderobo en trajno-stacio povas servi por kaŝi socian maldecon – kaj ĝi jam estis uzita por tiu celo en la pasinteco – sed tio apenaŭ povas esti konsiderata kiel stabila bazo por bona societa pozicio.

**Jack.** Ĉu mi rajtas demandi vin, do, kion vi konsilus al mi fari? Mi ne devas diri, ke mi farus ĉion ajn por certigi la feliĉon de Gwendolen.

**Lady Bracknell.** Mi forte rekomendus al vi, Mr. Worthing, provi akiri iujn parencojn kiel eble plej baldaŭ, kaj absolute strebi ekhavi almenaŭ unu el la gepatroj, el ajna sekso, antaŭ la fino de la sezono.

**Jack.** Nu, mi ne scias kiel mi sukcesus fari tion. Mi povas akiri la mansakon ĉiumomente. Ĝi estas en mia vestaĵejo hejme. Mi vere opinias ke tio devas kontentigi vin, Lady Bracknell.

**Lady Bracknell.** Min, sir! Kiel tio estas ligita al mi? Vi ja ne imagas, ke mi kaj Lord Bracknell entute revus lasi nian solan filinon – knabinon edukitan kun la plej granda atento – edziniĝi kun garderobo, kaj fari aliancon kun pakaĵo? Bonan matenon, Mr. Worthing!

[**Lady Bracknell** eliras kun majesta indigno.]

## **Jad-Vaŝem: florojn nome de ELI kaj UEA**

**Amri Wandel**

---

Jam dum ok jaroj reprezentntoj de E-Ligo en Israelo metas florkronon en la publika memor-ceremonio okaze de la holokaŭsta tago en *Jad-Vaŝem* (la ŝtata institucio pri eternigo de la Holokaŭsta memoro) en Jerusalemo. Dum tiu ceremonio metas florkronojn pli ol cent israelaj kaj eksterlandaj institucioj – inter ili la prezidento Ŝimon Peres kaj la ĉefministro Benjamin Netanjahu nome de la registaro. Ĉi-foje metis la florkronon nome de ELI kaj UEA Malka Zemeli, Jehuda Miklaf kaj Amri Wandel. Kurioze, la sekvan florkronon en la vico metis judoj el Bjalistoko, kaj la antaŭan –

savitoj el la urbo Slonim (Belorusio): unu el tiuj estis Tsvi Shefet, la prezidanto de la Slonima komunumo, bona konato de mia bopatrino.

Post la finiĝo de la solena ceremonio mi alparolis la longjaran prezentiston de la bukedo-metantoj, s-ro Benny Hendel, kun kiu mi konatiĝis en la antaŭa jaro. Mi proponis al li venontjare prezenti nin ankaŭ en Esperanto, kiel oni faras por kelkaj eksterlandaj delegacioj. La propono plaĉis al li, kaj en lastatempa korespondado li konfirmis tion kaj petis min prezenti tion al la organizantoj en "Jad-Vašem".

Alia interesa kuriozaĵo: la turka anglalingva ĵurnalo "Hürriyet Daily News" aperigis artikolon pri la evento kaj du el la reprezentantoj de ELI aperas klare en ĝia reta bildaro

<http://www.hurriyetdailynews.com/Default.aspx?pageID=447&GalleryID=550&gpid=20>



## ***Mia stelo* (Felicja Raszkin-Nowak) - delicaĵo de la holokaŭsta literaturo en Esperanto**

### **Unua parto**

### **Recenzas: Andreas Künzli**

Kiu en la 1920aj jaroj naskiĝis kiel judo en Pollando, spertis verŝajne relative senzorgan kaj feliĉan junaĝon, sed post 1933 riskis travivi la inferon – kaj perdi sian propran vivon. Tiun sperton vole nevole faris ankaŭ Felicja Raszkin-Nowak, naskita la 23an de decembro 1924 en Varsovio, kiu rakontas sian tragikan vivhistorion en la libro *Mia stelo*. Al la ideo noti siajn rememorojn ŝi venis en 1989, kvindek jarojn post la eksplodo de la 2a mondmilito. Al ĉi tiu decido konvinkis ŝin pensoj pri la jaro 1968, kiam en ŝia pola patrujo denove ekflamis ondo de antisemitismo, kaŭzanta amasan forveturon de judoj, kiuj estis savitaj



dummilite. Fine de 1971 ŝia familio forlasis Pollandon kaj iris al Kopenhago, Danlando, kie la vivo devis esti rekomencita.

La libro fariĝis 17-ĉapitra emociiga rakontaro, kiu komenciĝas per la infanaj jaroj de la aŭtorino kaj kiu finiĝas per epilogo kaj kompletigo. En la 30aj jaroj Felicja Raszkin vigle frekventis la lernejon. En la lernejo ŝi interesiĝis antaŭ ĉio pri historio, volonte ŝi skribis taskojn en la pola lingvo, allogis ŝin geografio kaj la matematikon ŝi ne satis. Felicja Raszkin sukcesis aliĝi al la gimnazio, kvankam tio kostis al ŝiaj gepatroj multe da mono. La 12an de majo 1935, ĉe la stratoj vidiĝis naciaj flagoj, mallevitaj ĝis la duono de la mastoj, kaj sur ili flirtis longaj, nigraj rubandoj. La homoj portadis funebrajn bendojn sur la brakoj. Tio signifis, ke forpasis la pola Gvidanto Józef Piłsudski. Erao en Pollando finiĝis. La mondo de Raszkin estis ankoraŭ malgranda, tiel ke ŝia vivo turniĝis preskaŭ nur ĉirkaŭ diligenta lernado. Same kiel en la popollernejo ĉiuj lecionoj estis en la pola lingvo. Inter la fakoj troviĝis la religio kaj la historio de la judoj. Deviga fremdlingvo estis la germana, kaj post la lecionoj eblis kromlerni la hebrean kaj la anglan, sen notoj en la diplomo. Sabate ŝi ne vizitis la gimnazion.

### **1933 kaj la sekvoj**

Post 1933, kiam Adolf Hitler akaparis la povon en Germanio, la etoso malsereniĝis ankaŭ en Pollando. Kio sekvis, estis neimagebla kaj apenaŭ kredebla. Vespere la patro de Raszkin legis ‘Mein Kampf’ kaj kun ĉagreno konsideris la aktualajn politikajn eventojn en la mondo. Tio tre maltrankviligis la gepatrojn, kiel la aŭtorino memoras. Ili ĝuste antaŭsentis la militan tragedion, kiu baldaŭ atingos ankaŭ Pollandon.

Do, la bela epoko finiĝis subite la 1an de septembro 1939, kiam la armeoj de la nacisocialistoj enpenetris Pollandon por konkeri ĝin kaj persekuti la popolojn tie vivantajn, antaŭ ĉio la judojn.

Post la bombado de Varsovio Felicja Raszkin fuĝis en orienta direkto, al Bjalistoko, kiu estis ŝia dua familia urbo, kie vivis la avinjo kaj multaj parencoj kaj kie restis la paĉjo. Por kuniĝi kun ili necesis transiri la riveron Bug, kiu samtempe formis la limon kun Sovetunio, ĉar la oriento de Pollando estis okupita jam de la sovetia armeo.

### **En Bjalistoko**

En sekvaj ĉapitroj Felicja Raszkin priskribis la etoson en Bjalistoko sub la sovetia kaj poste sub la germana regadoj. Kiaj teruraj tempoj! La novaj mastroj detruis ĉion antaŭan kaj trudis sian propran politikan sistemon. Ni ĉerpu iom el la teksto.

“Ni estis ĉe la sovetia flanko. Ni ekiris tra la urbeto. Ĉi tie estis multe da fuĝintoj, kiuj staris sur la placo kaj interparolis pri siaj travivaĵoj dum la germana

regado. Ili fiksas kun la koĉeroj la veturprezon, planis ion por la estonteco. Tranokto kun kusenego donis kvietan dormon post la elĉerpa longa vojaĝo. Matene mi rigardis marŝantajn rusajn soldatojn, kiuj ankaŭ estis invadintoj en nia patrolando. Vestitaj per longaj manteloj sen orlita rando, ilia cindrobruna koloro fandiĝis kun grizo de la pavimo. Sur la kapoj ili havis ĉapojn kun pinto meze kaj kun pendantaj ŝirmiloj, kiuj balanciĝis kiel azenaj oreloj. Multaj vizaĝoj estis kun mongolaj okuloj, iom plataj nazoj kaj larĝaj vangostoj. Unuafoje ni vidis tiajn homojn. Ili ne havis epoletojn kun rangoj, kaj nur malgrandajn triangulojn sur la kolumnoj kaj estis malfacile je la unua vido distingi oficiron de soldato. Ili ne similis polajn kaj germanajn militistojn. Ĉiuj ĉi junuloj rigardis serioze kaj eĉ kiam ili kantis, ili ne ridetis. La komunajn kantojn interrompis lirikaj voĉoj de solistoj.”

“Interesis nin la situacio en Bjalistoko. Post mallonga ripozo ni devos aliĝi al la nova vivo-ritmo. La urbo estis ŝtopita de fuĝintoj, ĉefe judoj, kiuj timis persekutadon en Polujo okupita de hitleranoj. Ili serĉegis ian savon por si. Plej multajn oni lokis en la malnova sinagogo. Ili nestiĝis en primitivaj kondiĉoj kaj granda mizero. (...) La paĉjo komencis laboron kiel librotenisto (...). La panjo havis malgrandajn ŝancojn por labori en la profesio de kosmetikistino. (...) Ŝanĝiĝis la etoso kaj la kondiĉoj. Ĉio griziĝis. Neniu pimpigis sin, krom rusinoj – oficiraj edzinoj (...) La lernejoj estis malfermitaj, sed reformitaj laŭ la sovetia dekjara instruprogramo. (...) La instruado estis okazanta en la pola lingvo, sed aldoniĝis du novaj lingvoj – la rusa kaj belorusa, kaj ankaŭ la germana kiel fremdlingvo. (...) Pri ĉiu lernejo zorgis rusa milita trupo. Do, ofte vizitis nin oficiroj kaj ili aŭdigis sian prelegetojn, kaj grupoj de talentaj lernantoj estis invitatataj al prezentadoj antaŭ soldatoj. Ni devis partopreni ĉiam pli longajn solenajojn en diversaj festotagoj kaj atendi nian vicon. Sed estis bona publiko. La rusaj soldatoj akceptadis nin kore kaj dankeme aplaŭdis. Ili regalas nin en sia kantino, donis al ni dolĉaĵojn. La provizado de la vendejoj estis modesta, ĉiam mankis io, sed laŭ sovetia kutimo oni aranĝis specialajn liverojn okaze de la ŝtataj festoj. Do, ni omaĝis la 1an de Majo kaj la Oktobran Revolucion ne nur per ruĝaj flagoj, sed ankaŭ per mandarinoj, halvo kaj bombonoj. (...).

Sekvis ankaŭ gravaj ŝanĝoj en la familia vivo. La domon de ŝia avinjo oni ŝtatigis. Do, oni devis forlasi la loĝejon, kaj la tutan frontparton okupis sovetiaj militistoj. En la alo oni restigis onklinjon Annan kaj oĉjon Jakobon Ŝapiro, la esperantiston, sed ilia sorto ne estis certa. La poresperanta agado de la oĉjo devis esti prokrastita. La internacian lingvon bezonis neniu, la eksterlandaj kontaktoj iĝis suspektindaj, Raszkin lamentis.

### **Germana-sovetia milito**

Kiam en 1941 la germanoj atakis Sovetunion, la aviadiloj ĵetis ankaŭ bruligajn bombojn super Bjalistoko. Felicja Raszkin denove disfuĝis, piede centojn da kilometroj sencele tra la ĉirkaŭa regiono, por serĉi protekton ĉe fremdaj homoj: “Ĉie la homoj estis same konsternitaj pri la milito. Ili ne povis kompreni, ke Germanio atakis Sovetion, malgraŭ la subskribita pakto pri neagresado”, Raszkin notis.

“Ni devis nin gardi ne nur antaŭ la germanaj soldatoj, sed ankaŭ por ne fidi vilaĝanojn. Serĉante vespere tranoktejon, ne ĉiam ni estis akceptataj kun la sama koreco. Okazis, ke oni rifuzis al ni helpon, parolante ke certe ni estas judinoj. Anstataŭ neadi, ni plu marŝis.”

Kiam la sovetianoj fuĝis el Bjalistoko, la nova reĝimo sub la germanoj fariĝis multe pli kruela, ĉar la germanoj celis la forpelson kaj murdon de la judoj. La unuaj bomboj, falantaj sur Bjalistokon, malbridis panikon, same kiel en Grodno. La sovetia militistaro kaj civiluloj laborantaj en diversaj rusaj oficejoj, tute surprizitaj per la militeksplodo, forlasis la urbon tumulte. Ili provis fuĝi per vagonaroj, kamionoj kun soldatoj aŭ per siaj veturiloj. La germanoj mitraladis la vojojn kaj multaj estis pafitaj tuj en la komenco de la fuĝo. Raszkin informiĝis pri la fama kruelega krimo de la germanoj, kiuj la 27an de junio enfermis preskaŭ 800 homojn en sinagogo kaj bruligis ĝin: “La vidintoj longe aŭdis terurajn kriojn de la viktimoj, kaj post la sinagogo restis cindro kaj brulnigraj ostoj. La tuta kvartalo estis detruita, kaj en la pogromo oni murdis ĉirkaŭ 2000 judojn.”

### **Vivaĉo en la getto**

La 2an de aŭgusto 1941 oni fermis la pordegojn de la getto. Raszkin: “Malantaŭ la pordegoj estis alia mondo. Niaj stratoj pli malriĉaj, niaj loĝejoj pli mallumaj, homoj malsataj. Oni senigis niajn okulojn je la tuta verdaĵo de la parkoj kaj herbobedoj, kaj niajn orelojn – je ĉiuj sonoj de la kantantaj birdoj. Ni perdis aspekton de la normalaj homoj, kiuj iras sur la trotuaroj. Eĉ la ĉielo perdis sian bluan, ĉar la kapoj ne leviĝis, sed klinis sin al la griza pavimo. La laboro ekster la getto fariĝis plej valora, ĝi donis kontakton kun la urbo-vivo pulsanta ĉirkaŭe. Ne plu grava estis loko, nek laboro tie, nur elgliti el tiu ĉi malliberejo! Pro mia laboro ekster la getto mi havis fenestreton al la granda mondo.” Dume, la patro de Felicja Raszkin estis deportita, kune kun Jakobo Ŝapiro, la esperantisto. Malgraŭ la granda malamo, kiu ekregis en Bjalistoko, Felicja, ne ankoraŭ 20-jara, spertis sian unuan amon – Stefano. Raszkin sincere priskribis siajn sentojn kaj emociojn por li. Sed poste li perdiĝis.

La malfacila kaj naŭza vivado en la bjalistoka getto, en kiu Felicja Nowak pasigis sian plej malfeliĉan vivotempon, estas skizita tra pluraj ĉapitroj.

Ŝi mem trovis laboron aŭ en teksejo aŭ en tabakfabriko. Temis pri vivo kun mortverdikto. Regis la fatalismo laŭ jena filozofio:

“– Iel ni saviĝos, la germanoj devas ja malvenki – ni diradis.

– Ili malvenkos, sed ĉu ni ĝisvivos – suspiradis Tolĉsjo.“

Ĉi tiuj germanoj kondukis kiel furioj kaj bestioj en la getto. Ili malhelpis, ĉikanis, sufokis. persekutis, turmentis kaj punis la judojn ĉie kie eblis. Ili pendigis homojn ĉe la galgo, detruis la getton, sendis pli kaj pli da viktimoj al koncentrejoj kaj neniigejoj kiel Treblinko kaj Aŭŝvico. Por la judoj necesis pripensi kiel savi sin mem. “La aliaj diradis, ke la germanoj kondamnis nin al morto, kaj estas nur la afero de la tempo, kiam ili efektivigos la verdikton. Neniu povis forgesi la tragedion, sed eĉ la pesimistoj aŭskultis vortojn de la espero. Mia panjo kredis je la savo kaj ne volis pensi, ke oni plilongigis al ni la vivon nur por kelka tempo.“

Raszkin raportis, ke en 1943 la ribelo en la varsovia getto estis sufokita, aliflanke la batalo de Stalingrad estis malvenkita por la germanoj, kiuj fariĝis pli kaj pli nervozaj. La krakova getto estis likvidita, kaj en Bjalistoko prepariĝis la translokado de la judoj al Lublino. Feliĉe, Felicja povis eskapi la selektadon.

“La getto prezentiĝis terure. Kadavroj en sango, vunditoj sen helpo. Detruitaj loĝejoj, disĵetitaj mebloj kaj vestoj, rompita fenestrovitroj kaj vitropecoj disfalantaj sub la piedoj. Elrompita pordoj de la malplenaj domoj. Ĉie ŝvebanta plumaro el disfenditaj kusenegoj. Sufoka brulodoro.”

Felicja Nowak havintus la opcion fuĝi el la getto, sed trifoje ŝi revenis, ĉar en la getto loĝis parencoj, inter la plej proksimaj ŝiaj avino kaj patrino, de kiuj disiĝi ŝi ne povis kaj ne volis. Felicja renkontis polajn vilaĝanojn, konatojn de ŝia familio, kiuj helpis per nutraĵoj, sed poste ŝi perdis la kontakton kun ili. Post la morto de la avino ŝi sentis sin treege korlignita kun sia patrino, kaj ŝi devis trovi respondon al la demando ĉu fuĝi aŭ resti. Finfine ŝi decidis forlasi la getton, por savi sin mem.

(daŭrigota en la sekva numero)

## Filatelaj novaĵoj el Israelo

**Jehoŝua Tilleman**

---

Kolekti poŝtmarkojn mi komencis infanaĝe laŭ sugesto de mia patro ankoraŭ en Sovetunio kaj daŭrigas mian hobion ekde tiam. La plimulto de miaj poŝtmarkoj bedaŭrinde ne kuŝas en albumoj pro miaj aliaj okupiĝoj,

sed mian Esperanto-kolekton mi konstante prizorgas kaj ampleksigas ekde mia esperantistiĝo en 1970. Jam kelkajn jarojn mi membras en la Israela Societo de Laŭtema Filatelo (hebrea mallongigo: **AJELET**), parto de la Israela Filatelista Federacio (I.P.F.). Antaŭ pluraj monatoj demandis min rete d-ro Joram Lubianiker, la redaktoro de nia kvaronjara bulteno **Nos'on**, ĉu mi estus preta verki artikolon pri Filatelo kaj Esperanto por la proksima numero kun la ĉeftemo "Komunikado". Konante mian malskribemon li proponis, ke mi eble komisiu la verkadon al iu alia, sed mi decidis akcepti la defion. Mi nur demandis kiom ampleksa devus esti la artikolo, kaj la redaktoro bonŝance lasis al mi la liberon mem decidi. Ĉu vere bonŝance?

Do, mi prenis kiel bazon la hebrelingvan klarigon el la faldfolio, kiu akompanis la emision de la Israela E-poŝtmarko (la 2006-12-17) – ties tri-lingvan tekston mi mem ja verkis – kaj "ekpumpis" ĝin. Pene laborinte dum preskaŭ du monatoj mi fine povis sendi al la redaktoro ĉirkaŭ dekon da paĝoj,.. sed nur pri la historio de la internaciaj lingvoj, de Esperanto mem kaj de ties kreinto, nenion ankoraŭ pri la poŝtmarkoj. Mi timegis, ke nun la redaktoro postulos draste redukti la historian parton kaj pluverki la poŝtmarkan, sed nenio tia okazis. Anstataŭe, li proponis publikigi la duan parton en iu el la venontaj numeroj, avertante min, ke la jam pretan parton li devos iom mallongigi por enlasi ankaŭ pritemajn bildojn de poŝtmarkoj. Post nelonge la redaktoro sendis al mi la presprovaĵon, ornamitan per belegaj kolorfotoj (bedaŭrinde nigra-blankaj en la bulteno mem pro buĝetaj limigoj), kaj mi devis labori plu por ĝin korekti. Fine aperis la julia-septembra numero, kun du E-poŝtmarkoj sur la fronta kovrilo (kaj pluraj interne), en kiu, komence de la redaktora enkonduko estis prezentita mia malferma okpaĝa



Revuo "Ŝovel" kun la folio de la neaperinta Esperanto-poŝtmarko de la UK en 1967



artikolo. Nur unu problemo makulis mian ĝuon: la reciprokaj korektoj provokis la presejan –aŭ pli precize "Word"-an koboldon – por mismeti paragrafon (la revuo "Nos'on" kun la unua parto (la suba bildo).

Nun mi intencis longe ekriposi sur laŭroj ĝis la redaktoro petos la duan parton, sed... mia prospero estis maldaŭra. Venis post du-tri semajnoj plia redaktora mesaĝo, per kiu li urĝ-rekrutis min (kvazaŭ pro subita milito – kiel li ŝerce prezentis la situacion en la posta revu-numero) ekverki la daŭrigojn kaj "savi la patrujon"(!). Temis nome pri promesita artikolo de iu membro, kiu sufiĉe anticipe bonvolis informi la redaktoron, ke li ne kapablos ĝin verki. Do, vole-nevole, mi denove akceptis la defion. En la unua ĉapitro mi koncize prezentis la ĉefajn avantaĝojn de Esperanto. Poste devis sekvi en kelkaj ĉapitroj longa kronologia vico de ĉiuj filatelaĵoj iam emisiitaj en Esperantujo, ĉiu kun sia kataloga numero, por ke la redaktoro kapablu trovi la bildojn (precipe tiujn de la plej raraj kaj multekostaj) La ideo mem ŝajnis al mi tre enuiga, do mi kreis spicitajn priskribojn por igi la tuton facile digestebla far la legontoj. Post pliaj du monatoj kaj kelkaj spron-mesaĝoj de la redaktoro, kies lasta ĉi-jara numero estis signife malfruanta, li ricevis de mi la duan parton. Denove sekvis liaj mallongigoj kaj miaj reĝustigoj (pro kiuj la supremenciita koboldo ĥaosis la E-

alfabeton en la unua ĉapitro), denove mi ricevis la presprovaĵon kun koloraj pm-bildoj, kaj jen... aperis la daŭrigo kaj fino de mia monografio pri E-o kaj Filatelo, ĉi-foje eĉ dek-paĝa! Krome mi eluzis la petolaĵojn de la koboldo kaj sendis tutpaĝan "Leteron al la Redakcio" korektante la erarojn en ambaŭ partoj de la artikolo – kaj tiel E-o estos menciita en tria sinsekva numero de la bulteno! Mi nur esperas, ke ekde nun ĉiu membro en la organizita filatelisto movado en Israelo almenaŭ scios pri la ekzisto de nia lingvo.



Kiam mi fine povis ekriposi kaj reveni al miaj urĝaj E-aferoj, evidentiĝis al mi, ke miaj penoj pri la artikolo ne estis vanaj. Trafolumante la revuon **Ŝovel** (de nia tegmenta filatelista asocio) mi subite rimarkis en la listo de la israelaj pm-oj emisiitaj en Septembro konatan blazonon sur poŝtmarko pri la 50-jariĝo de la israela filio de I.P.A. (Internacia Polic-Asocio – ne konfuzu kun **Interpol**), okaze de ties Monda Kongreso en Ejlat. Temas pri profesia ne-politika organizo de policanoj servantaj kaj pensiulaj kun 400,000 membroj en 64 landoj, kiun fondis en 1950 brita policserĝento Arthur Troop. Kvankam mi malkovris nenion pri lia esperantisteco, li ja decidis pri la devizo kiu aperas ekde tiam sur la Asocia blazono: "**SERVO PER AMIKECO**"; kaj ĉiu poŝtmarko aŭ stampo kun aŭ sen la blazono emisiita porokaze de I.P.A. apartenas al la temo "Esperanto", aŭ pli vaste al la t.n. "**Judaica**". El la kelkdeko da I.P.A.-stampoj en Israelo aperis jam kvar, sed post Aŭstralio kaj Luksemburgio Israelo estas la **tria** lando tutmonde, kiu emisiis eĉ poŝtmarkon! La devizo klare videblas en la pm-o kaj eĉ pli grandlitere sur la talono, plus traduko hebrean. En la oficiala faldfolio akompananta la pm-on kaj hebree kaj angle aperas klarigo pri la Esperanta devizo.



*Kompare kun la preskaŭ unujara laboro, kiun mi dediĉis al la emisio de la unua israela pm-o fine de 2006, ĉi-foje mi tute ne devis peni. Ne estas do mirinde, ke post tiu plezuriga surprizo mi sentis min (laŭ la fama hebrea antikva diraĵo): "Feliĉas la justuloj, ĉar ties laboron faras aliuloj".*

## **Persona Angulo: Joni Kis-Lev** *E-resumo: A.Wandel*

*Joni Kis-Lev (1985) estas la prezidanto de JELI. Li studis arton en kolegio Pearson en Kanado kaj eksponas tutmonde. Li aktivas pri israela-palestina interparolado kaj deziras ke Esperanto ludu rolon en la interkompreniĝo de la du popoloj. Tiun ĉi artikolon Joni skribis laŭ sia*

*stimula prelego hebrelingva dum la Zamenhofa Vespero. Por niaj legantoj kiuj ne scipovas la hebrean jen resumo en Esperanto.*

Mi unue aŭdis pri Esperanto en la aĝo de 13. Poste mi en pluraj okazoj reaŭdis pri la lingvo, kaj eklernis ĝin kiam mi estis en la armeo. Iom post iom ĝi fariĝis pli komforta, kiel en geedza vivo: post la geedziĝo oni devas



Fotis: Amir Djalovski

prizorgi la varman interrilaton. La lingvo fariĝis por mi grava ĉar ĝi estas bonega ekzemplo por realigo de revoj.

Ĉiam denove mirigas min la persisto de Zamenhof kaj liaj daŭrigantoj pri la kreado kaj evoluigo de internacia lingvo. Mi provas efektiviĝi tiun ekzemplon por mia persona vivo. De juna aĝo mi revis fariĝi pentristo, sed miaj parencoj admonis ke oni unue devas sin vivteni. Mi kredis ke ĉiuj pentristoj estas malriĉaj, sed ŝanĝis tiun mian koncepton post renkontiĝo kun profesia aĝa pentristo, Jimmy Wright, kiu vivis en granda impona domo kun studio kaj baseno – ĉio perlaborita per

pentrado. De tiu momento mia vivo ŝanĝiĝis. Mi komencis serĉi pentristojn kiuj vivtenas sin de sia arto, kaj trovis ke ekzistas pentristoj kiuj gajnas tre bone kaj vivas plenan vivon. Pluraj el ili fariĝis miaj mentoroj kaj instruis min ion, kiu helpis al mi evoluiĝi kaj fariĝi la persono kiu mi estas hodiaŭ.

Tiu persono (mi) vendas siajn pentraĵojn en naŭ galerioj en la mondo, inkluzive de Toronto, Florido kaj Berlino. Mi rakontas tion ne por impresi vin, la leganton, sed por pruvi, ke se oni trovas la ĝustajn gvidantojn kaj instruistojn, oni povas atingi kiun ajn revon, ne gravas kiom fantazia. Ŝajnas ke ĉiu sukcesa fama persono havis gvidanton, helpanton, konsilanton, kiel mentoron. Ekzemple Martin Luther King havis Thurman, kies mentoro estis Gandhi, kaj tiu havis Tolstoj ktp. Se vi mem volas fariĝi pli granda kaj atingi pli grandajn celojn ol nun, mi konsilas: trovu vian mentoron, kiu povos helpi vin realigi tion. Demandu vin kiu estas granda en la tereno en kiu vi deziras kreski. Kiu inspiras vin? Kiam vi trovos,

senhezite turnu al ili kaj koncize rakontu pri vi, sed pli grave, rakontu pri ili. Montru ke vi interesigas pri ili kaj ofertu helpon, eĉ pri ŝajne bagatela afero. Mi ne trovas vortojn por klarigi kiom grande kaj grave tio estas. Mi mem estas entuziasma plu krei kaj pentri, kaj daŭre serĉas pliajn mentorojn kiuj povos progresigi min plu. Mi estas ekcilita evoluigi mian karieron kaj revas pri kombino de arto kaj arkitekturo, kiel la grandaj artistoj Gaudi el Barcelono kaj Hundertwasser el Vieno. Mi ne povos fari tion sen mentoroj. Kaj kio pri vi? Pensu pri tio. Aŭdacu. Vi ne bedaŭros.



el asprnato ŝmecti lraŝona bgil 13. ŝicor anglit, uahd talmidim ŝual btŝkol lma la ilko lēŝot ŝfa ioter klah. hmora enta bolool ŝnicol ŝfa kōat, kralo la asprnato, abal ha nŝlah. hcl matol hragc, ŝŝm hōa hcl lliki. maohar ioter ŝmecti, krali, ontkliti bŝfa ŝob uŝob. ihŝit lŝfa ŝnŝlah, ha nraata li di boect.

lmdti at ŝŝfa bgil hŝba, ולאט לאט ha hfka li lioth uioth noha. ediiŝ iŝ kŝiim, abal ŝa kmol kŝiim bozioti. ŝiioŝk kbr nēŝa, abal eŝŝio crik ŝlŝmr at ihŝim hmim. ŝiiba ŝŝŝfa hfka lioth ebori hŝoba ha ŝha mēooh ebori doama nēdrt lahŝmt hlomoth. ŝŝfa noloda krcioŝ bmocho ŝl zmnēoŝ. lŝēŝa, roo dhbriim htochim ŝkibno, thilitŝm brēioŝ bmocho ŝl adŝ. mlbd mtntot hŝbec, ano moŝŝim bhŝdriim hbrtiim omidniim, moŝriim, thbora, lbuŝ omzon, ŝkl kolŝ hm iciri adŝ. hrcioŝ hmtrif ŝl licor ŝfa binlaomiti, uhoŝr hnkonot ŝl zmnēoŝ, uŝl mŝŝiŝio, lhcncē ldrth mbitm hēiŝtorih, mdehim otu ŝob uŝob.



את השיעורים הללו, שלמדתי מזמנהוף ומאספרנטו, אני מנסה ליישם בחיי שלי. מגיל צעיר תמיד אהבתי לצייר, אך לא חשבתי שאוכל להתפרנס מזה. חתמתי בגאווה את שמי, "קיסלויב" על ציורים, והראיתי אותם לקרובי משפחה. כשסיפרתי שהחלום שלי הוא להיות צייר, אמרו לי שזה יפה מאוד שאני רוצה לדאוג ללב, אבל חשוב יותר לדאוג לכיס. אז קצת הזנחתי את זה. אבל עם השנים, החלום שב ועלה, וכל כולי שיווע לצייר, עוד ועוד.

המזל שלי השתנה כשמצאתי צייר מבוגר שהתפרנס מהציור. הצייר, ג'ימי רייט Jimmy Wright, נפטר זה מכבר, אבל בפוגשי אותו בגיל הנעורים שלי, קיבלתי לראשונה תמונה חדשה של המצב. עד אז, כל האמנים היו "תפרנים". אך החל מאותו הרגע, הציורף "כל האמנים" הפך ל"רוב האמנים". רייט התגורר בבית גדול ומרשים, עם סטודיו חלומי, גדול, עם אור טבעי, ואמר לי ש"כל זה, מסביב, הבית, והבריכה, וחדר המדיטציה, זה הכל מהציורים. ומאותו הרגע חיי השתנו.

התחלתי לחפש אמנים חיים שמשתכרים מעבודתם, וגיליתי שיש כאלה שמשתכרים יפה מאוד, ובמקביל חיים חיים מלאי תשוקה. חלקם הפכו למנטורים בשבילי. כך, למשל, האמן אבי בן שמחון Avi Ben Simhon שלימד אותי שעלי לצייר את אותו ציור שוב ושוב, עד אשר אמצא "סגנון חתימה" משלי, כך שאנשים יזהו את ציורי מרחוק. כך למשל, האמן דוד גרשטיין David Gerstein שעודד אותי למכור במחירים זולים, אבל העיקר למכור על מנת שיהיה לי כסף לקנות עוד חומרים ולהתפתח. כך למשל, האמן רפי פרץ Raphael Perez שעודד אותי לא להתבייש ברצון שלי לצייר בסגנון ילדותי, שמכונה נאיבי, וסיפר לי שמדובר בז'אנר מוכר לכל דבר, שמוערך בעולם. כל אחד ואחד מהמנטורים שלי, סייע לי להפוך למי שאני היום.



היום אני מוכר ציורים בתשע גלריות ברחבי העולם, כולל בטורונטו, פלורידה וברלין, ומוכר את ציורי באלפי דולרים. אני לא מספר זאת כדי להרשים אותך, הקורא, אלא כדי לרשום במוחק, מה אפשרי עבורך. אני מאמין שבעזרת מציאת המנטורים המתאימים, כל אחד יכול להצליח, בכל תחום שהוא, ולא משנה לי כמה החלום נדמה כלא מציאותי. מחקירת חייהם של האנשים המצליחים עולה שלרובם המוחץ היתה דמות מסייעת, מכווניה, מייעצת - דמות של מנטור. למרטין לות'ר קינג היה זה הווארד ט'ורמן, ולט'ורמן היה זה מהטמה גנדי, ולגנדי היה זה ליאו טולסטוי, וכך הרשימה הולכת ומתמשכת. דומה שכל אדם גדול בהיסטוריה האנושית, נעזר באדם גדול אחר. כך, אם ברצונך להיות גדול יותר מכפי



שאתה עכשיו, שזוהי נטייה טבעית לחלוטין, אני מעודד אותך, הקורא, לשאול את עצמך מיהם הגדולים בהם תוכל להעזר? מי יוכל להעניק לך השראה, להיות יד מכוונת עבורך? כשתמצא את אותם האנשים, אני מציע לך לפנות אליהם, בלי היסוס, ולספר להם על עצמך קצרות. חשוב מכך, ספר להם אודות עצמם, אודות כיצד אתה רואה אותם. החמא להם באופן כנה, בכך שתדע יותר מכל אחד אחר אודות ההיסטוריה שלהם, וספר להם כיצד אתה מתרשם ומעריך החלטות שקיבלו במהלך חייהם. אחר כך, הצע להם ערך. ספר להם כי ברצונך לעזור להם בדבר מה. זה יכול להיות הדבר השולי ביותר, אבל הנכונות שלך לעזור עתידה ליצור בקרבם את הרושם כי אתה אינך שואף לבזוז את זמנם, כי אם לסייע להם.

כל דבר, החל מהקשבה, עזרה בדברים שוליים הסעות, שמרטפות, הפניית תשומת לבם לעניין אותם, ועוד. על שאין לך מה להציע, אני מספיק, תוכל למצוא כמה תוכל למצוא דמות חלומותיך שלך. והדבר את היכולת להסביר לך

ולצייר. בכל שלב בדרך נוספים, ברמה גבוהה שיוכלו להאיר באור ספינתי בחושך. אני נרגש הקריירה ומימוש שלי, שכוללים בין היתר וארכיטקטורה, כמו האמן שבספרד, או הפחות ידוע הונדרטווסר מוינה לעשות זאת ללא



מה תוכל להציע להם? מתן פרספקטיבה רעננה, כמו ענייני מחשב, תשלום תשלומים, לדברים אשר עשויים אף שאתה עשוי לחשוב בטוח שאם תחשוב דברים להציע להם. וכך, שתסייע לך בקידום הוא כה גדול, עד שאין לי כמה גדול הוא.

אני נרגש להמשיך ליצור אני מחפש מנטורים יותר של יצירה והישגים, מגדלור את הדרך עבור מאוד לגבי המשך הפרוייקטים העתידיים שילוב של אמנות הנפלא גאודי מברצלונה אך הלא פחות טוב, שבאוסטריה. לא אוכל

מנטורים. ומה לגביך? חשוב על כך. העז. לא תתחרט.

יהונתן כיס-לב, יליד 1985, הוא יו"ר אגודת האספרנטו הצעירה בישראל. הוא למד אמנות בקולג' ע"ש פירסון Pearson בקנדה, ומציג בגלריות ברחבי העולם. כמו כן הוא פעיל בקבוצות שלום שונות בין ישראלים לפלסטינים, ושואף לראות את שפת האספרנטו הופכת לכלי לגישור בין קבוצות במזרח התיכון.

הציורים: שלום על ירושלים (פרט מהטריפטיך בכריכה), ירושלים בשחר, בריזה

## ELI funebras: Josi Ŝemer (1950-2012)

Amri Wandel

---

Tiu ĉi nekrologo konsistas el du partoj: la unua – persona, la adiaŭa parolo kiun mi faris dum la entombigo. La dua – oficiala, la nekrologo kiun mi verkis por Revuo Esperanto, aperinta (en la maja n-ro) en iom mallongigita formo. Krome ELI eldonos specialan memorlibron, kiu jam ekzistas rete: <http://www.esperanto.org.il/dosieroj/shemer.pdf>

*Josi - dum pli ol kvardek jaroj vi estis kolono de la Esperanto-movado en Israelo. Amata de ĉiuj, en- kaj eksterlande. Elstara kaj altstatura, ambaŭsence. Dum vojaĝoj kaj kunvenoj ni ŝercis, ke perдите en la homamaso, oni povas serĉi Josi, kiu videblas de malproksime. Prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo kaj poste, ĝis nun - Sekretario kaj Kasisto. Pli ol tri jardekojn ni kune kondukas la E-movadon en Israelo. Ŝajnas ke eterne vi gvidis la E-klubon en Tel-Avivo, ĉiumarde. Ĝi fariĝis parto de via vivo: kiam venis pli multaj partoprenantoj ol kutime vi estis feliĉa, kelkfoje vi kontaktis min por rakonti ... kaj kiam estis nur malmultaj, vi estis zorganta kaj malfeliĉa. Dum du jardekoj vi eldonis la bultenon "Israela Esperantisto", kaj dum la lastaj jaroj, kiam mi ĝin redaktas, vi skribas kaj alportas multajn artikolojn, provlegas kaj konsilas. En la lastaj jaroj vi verkis por la revuo serion da artikoloj "Rememoroj de ELI-veterano", sed ĝi restis nefinita. Vi ĉiam verkis la nekrologojn pri membroj kiuj forpasis – kiu verkos pri vi? Ĉiam vi pretis helpi, korekti kaj instrui – talenta kaj populara*



*preleganto. Pasintjare ni prelegis paralele en la Internacia Festivalo en Germanujo, kaj ni ŝercis, ke ni konkurencas pri la publiko. Mi diris, ke certe oni pli ĉeestos vian prelegon (pri la hebrea) kaj tiel estis. Via prelego "Kiu estas Judo" en la Universala Kongreso en Kubo antaŭ preskaŭ du jaroj estis plenplena. La ŝercoj el la juda humuro, kiujn vi sendis ĉiusemajne al centoj da sekvantoj ĉirkaŭ la mondo, fariĝis ege popularaj. Antaŭ la operacio vi skribis, ke estos paŭzo de du monatoj en la ŝercoj ... kaj nun ŝajnas, ke la paŭzo daŭros eterne. Vi havis multajn planojn por Esperanto-agado, precipe post la pensiigo, kiam vi komencis vojaĝi al E-kongresoj kaj konferencoj ĉirkaŭ la mondo, – kaj nun kiu ilin plenumos? Mi esperas, ke tion faros ni, la esperantistoj en Israelo, kaj tiel ni konservos la memoron pri vi. Adiaŭ.*

Josef (Josi) Ŝemer (1950-2012) mortis la 29-an de Marto en Tel-Avivo, pro komplikiĝo post-operacia. Profesie li estis instruanto pri fremda valuto en granda banko en Tel-Avivo. Li lernis Esperanton en 1966 ĉe la pola-israela aktivulo Isaj Dratwer, pro instigo de sia patro, kiu naskiĝis en Bjalistoko. Jam en 1967 li partoprenis la 23-an IJK-on, parte okazintan en Netanja. En la sepdekaj jaroj li aktivis en la junulara movado en Israelo, kunfondinte la Junularan E-Ligon (JELI) kaj prezidinte ĝin en la jaroj 1982-1986, kaj kunorganizis la 42-an IJK-on en Neurim (1986). Dum du jardekoj li redaktis la organon de ELI, "Israela Esperantisto" (1981-2001, sed helpredaktis jam kelkajn jarojn pli frue). Ekde 1975 li estis delegito de UEA – unue JD, poste FD (pri bankaj aferoj) kaj ekde 1989 ankaŭ Delegito de Tel-Avivo. Ekde 1993 ĝis sia morto li estis la kasisto de ELI, ekde 1999 ankaŭ ĝia sekretario, kaj en



2001-2008 ĝia prezidanto. De 1995 li estis Dumviva Membro de UEA, en 1999-2007 – komitatano A de Israelo kaj ekde 2008 – membro de Societo Zamenhof. Lia plej ŝatata kaj intensa agado estis la organizado de la Tel-Aviva Esperanto-Klubo, kiun li sindone kaj ame gvidis ĉiun mardon, ĝis sia enhospitaligo en Januaro 2012.

Ekde la 61-a UK en Ateno Josi partoprenis preskaŭ ĉiujn kongresojn kaj estis sekretario de la LKK de la 85-a UK en Tel-Avivo (2000). Li akiriis multajn geamikojn, kiuj aprezis lian amikemon kaj humuron. Li ofte (lastfoje dum la UK en Havano, en 2010 kaj dum la IF en Xanten, 2010-2011) prelegadis pri judaj temoj, kiel la hebrea lingvo kaj juda humuro, kaj liaj prelegoj estis tre popularaj kaj aprezataj.

Sur lia tomboŝtono estas gravurite "La batanta koro de la Esperanto-Movado en Israelo, amata tra la mondo", frazo kiu fidele priskribas lian Esperanto-vivon. Dum preskaŭ duona jarcento li estis piliero de la Esperanto-Ligo en Israelo, kaj samtempe konata kaj ŝatata internacie, aparte pro la "judaj ŝercoj", kiujn li sendadis regule al centoj da abonantoj de sia retlisto "Amantoj de judaj humuraĵoj". En Januaro 2012 li sendis la lastan mesaĝon, skribante: "En la venontaj semajnoj (eble eĉ monatoj) mi ne povos dissendi la judajn ŝercojn. Espereble la paŭzo ne estos tre longa...". Bedaŭrinde li ne sukcesis efektiviĝi sian revon eldoni la centojn da judaj ŝercoj, kiujn li dissendis. Tamen, ELI planas eldoni ilin libroforme, por memori lin laŭ maniero, kiun li verŝajne konsiderus la plej taŭga: per agado por Esperanto.







# La 69-a IJK en Israelo 19.8 – 26.8.13

## Mondaj demandoj – Esperplenaj respondoj:

### Socio, medio, ekonomio



Post surkamela veturo en la dezerto flosu kune sur la salega akvo de la Morta Maro en la plej malalta loko en la mondo! Varmiĝu en la abunda sunlumo kaj parolu pri daŭripovaj fontoj de energio



Biciklu tra la evoluiganta reto de padoj en Tel-Avivo kaj partoprenu la debaton pri verdaj kaj amikaj solvoj por la defioj de urba transporto



Marŝu en la antikvaj stratoj de la sankta urbo de Jerusalemo kaj spertu kunvivan en multkultura socio

Venu al nord-israela IJK!



Por ricevi plenan invitilon kun ĉiuj detaloj sendu la vorton "JES" al [ijk@tejo.org](mailto:ijk@tejo.org)